


junAmiko

33a jaro, n-ro 1/06 (115)

APRILLO 2006

INTERNACIA ESPERANTO-REVUO DE ILEI POR LERNEJANOJ KAJ KOMENCANTOJ



Kuraĝon,
volforton
ni deziras al vi,
kara Marino Curnis,
32-jara itala
esperantisto,
kiu per-piede trairos
tutan Eŭrazion.
Li havas antaŭ si
ankoraŭ
iom pli ol
39 000 kilometrojn.

Jen estas niaj du prestiĝaj revuoj!

KONTAKTO estas la plej vaste legata revuo de TEJO (legantoj en 90 landoj) pri diversaj landoj, popoloj, kulturoj por gejunuloj kaj ĉiuj, kiuj estas junaj en la koro.


Kelkaj artikoloj aperas en lingvaĵo

"facila" kaj "tre facila".

Ĝi aperas 6-foje jare.

Ni arde rekomendas ĝin!

TTT-pago: www.tejo.org/eldonoj.jsp



Ĉefa organo de Universala Esperanto-Asocio (UEA), kiu estas en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko.

ESPERANTO (legata en 115 landoj) aperas ĉiu-monate (escepte aŭguston) sur 24 paĝoj.

Ĝi informas pri la plej gravaj okazaĵoj de Esperantujo. Por esti aktuale informita pri Esperanto, vi devas ĝin legi! Utiligu la informojn, kiujn ĝi liveras al vi.

TTT-ejo: www.uea.org

Esperanto

revuo

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
99-a jaro • n-ro 1189 [2] • **Februaro 2006**

Vojaĝo al Italio



**Vendoplaco
de ideoj**

**Internacia
Televido**

**Silvestrumi
Esperante**

**UEA ĉe Monda
Socia Forumo**



PENSOJ POST UNU-JARA SPERTO

2005 estis por ni, redaktoroj sperot-dona jaro. Certe ankaŭ vi, kara leganto, elformis pri nia revuo ian bildon. Ni esperas, ke ĝi estas pli-malpli favora. Sed, ĉar neniu estas sen mankoj, ankaŭ Juna Amiko ne povas esti escepto. Ni estus tre dankaj, se vi malkaŝus antaŭ ni vian opinion (vidu niajn adresojn en la kolofono, sur paĝo 4) almenaŭ per kelkaj vortoj. Tio estus por ni tre valora kaj ĝojiga. Ni certe laŭeble utiligos viajn konsilojn.

Ni ne estas en facila situacio. Ja ni devas turni nin al tre vasta publiko – laŭ aĝo, intereso, eduko, kulturo kaj lingvo-scio. En naciaj lingvoj ĉiu tavolo havas sian apartan periodaĵon, sed niaj tavoloj estas tiel malmult-nombraj, ke aparte ili ne povas finance viv-teni po unu revuon. La nia, kiu celas multajn diversspecajn komencantojn, tuj mortus (dekoj da ekzemploj atestas pri tio en nia historio). Eĉ laŭ nuna strategio pasint-jare ni povis eliri nur en 1100-1200 ekzempleroj numere.

Se nia revuo plaĉas al vi, ni ege bezonas vian aktivan helpon.

Vi povas helpi per informado, konvinkado pri abono, artikoloj, utilaj kaj interesaj sciigoj, novaĵoj.

Ni konscias, ke tri eliroj jare ne povas rezultigi firman kontakton kun la legantaro, nek ĝustan reagon al aktualaĵoj de la mondo aŭ de nia movado, tamen tio estas multe pli ol nulo, ol tuta manko de cel-taŭga gazeto. Ĝis 2005 ni eliris 4-foje jare sur po 28 paĝoj ($4 \times 28 = 112$), nun, malgraŭ tio, ke ni aperas nur tri-foje, tamen vi ricevas 44 paĝojn pli ($3 \times 52 = 156$) ol antaŭe. Tio helpas nin teni la financojn en ordo, kaj sam-tempe liveri multe pli buntan enhavon en malpli ŝtopitaj paĝoj. Entute ĝi permesas al ni daŭrigi nian noblan laboron.

Ne forgesu, ke ni laboras por vi, kaj ke vi reagis al ni, se la kontakto estas bona. Sen bona kontakto ne ekzistas bona revuo. Ni ĵuru do plifirmigi ĉi tiun kontakton. Ni estas unuj por la aliaj kaj reciproke. Ni estas egale gravaj.

Optimisme tra la nuna jaro!

Geza Kurucz,
Stefan MacGill

ENHAVO

Tra Eürazio. Foto de A.Pásztor	1	Korpa krucaĵo (S.MacGill)	22
Pri Kontakto kaj Esperanto	2	Bild-strio „Emilerni” (S.MacGill) ...	24
Pensoj post unu-jara sperto	3	Interkultura mondo (E.Nadikova)	
Enhavo, kolofono	4	Grupo el Tajvano	26
Gefratoj Bolognesi (Saliko)	5	Kvino-kvizo (Stefan McGill)	30
La princino Liliana II.	6	Atako de la Boholeoj	
Alvoko al E-fabelkonkurso	7	(Hajni MacGill)	34
Paska rajdado (Dieter Berndt).....	8	Ĉiel-arko.	
Humuro (Jadranka Mirić)	10	Litova kanto por infanoj	35
Kamelo, dromedaro (Freitas)	11	Futbala ĉampionado (D. Berndt) .	36
W. A. Mozart (Marielen)	12	Helpanta mano (s-ino Saranath) .	37
Ĉu vi scias? (Zoltán Kurucz)	13	Senlacaĵaj abeloj (Zoran Ćirić)	38
Kecalo (J. de Campos Pacheco)..	14	Frandaj esprimoj kun „kapo”	38
Silabo-enigma (Dieter Berndt)	15	Testo pri lingvoscio (G. Kurucz) ..	39
Enigma parabolo (Lusi Rimon)	15	Medio-protektado (J. Felszeghy) ...	40
Ilustrita frazeologio	16	El nia historio (Á. Rátkai)	42
Ludu! (Geza Kurucz)	17	John Islay Francis (Ragnarsson)..	44
Poemo „Necesas” (N. Kurzens) ..	17	Verda paĝo (J. Brozovsky)	47
LUME. La Ularo (Monika Molnár). 18		Lingva doktoro (G. Kurucz)	49
Alumeta ali-meto (S.MacGill)	21	Projekto Trampolino (D.Kelso) ...	50

Sen pied-notoj JUNA AMIKO uzas la plej oftajn 1500 vort-radikojn, kiujn vi trovas en nia hejma-paĝo: www.junaamiko.inf.hu aŭ en www.lernu.net.

Eldonanto de JUNA AMIKO: ILEI, Riouwstr.172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.
Redaktoroj: *Stefan MacGill* (Pannónia u.30.I.6, HU-1136 Budapest, Hungario, stefan.macgill@gmail.com) kaj *Géza Kurucz* (Hitel u.10.fsz.16, HU-6000 Kecskemét, Hungario, geza@banyai-kkt.sulinet.hu)
Lingva revizianto: *Baldur Ragnarsson* (Islando).
Kunlaborantoj: *s-ino Saliko*, *Anja Karkainen*, *Vesa Pölkki* (Finnlando), *Elena Nadikova* (Rusio), *Neringa Zasaite* (Litovio), *Marie-Helene Desert* (Francio), *Jadranka Mirić* (Serbio), *s-ino Saranath* (Hindio), *Bardhyl Selimi* (Albanio), *Dieter Berndt* (Germanio), *Evandro de Freitas* (Brazilo), *Elizabeta Rajtmár*, *Zoltán Kurucz*, *Monika Molnár*, *Judit Felszeghy*, *Hajnal kaj Karina MacGill* (Hungario), *Marija Belošević* (Kroatio), *Michel Nkwirikiye* (Tanzanio), *Eugenia-Ecaterina Popoviciu* (Rumanio), *José J.Campos Pacheco* (Kubo), *Jasuo Hori* (Japanio), *Gian Piero Savio* (Israelo), *Nguyen Thi Ngoc Lan* (Vjetnamio).
Grafikistoj: *Pavel Rak* (Ĉeĥio), *Irina Nagy* (Rumanio), *Monika Molnár* (Hungario).
Komputila kolora tekniko: *János Bakk* (Hungario).
Presita en Presejo Saluton (Gárdi Jenő u.14, HU-1047 Budapest, Hungario).
Administranto: *Stefan MacGill* (adreso supre) kaj *Anna Besenyei* (Hungario), retadreso: esperanna@gmail.com

ISSN 0230 1318

La sekva numero aperos en septembro.

PRINCINO LILIANA KAJ LA BLANKA ĈEVALO

(Fino de la fabelo)

Rapide li prenis el malluma angulo de sia kabaneto kelkajn kuras-herbojn. Per tiuj la ĉevalo resaniĝis mirinde rapide.

Dum la sama tempo la reĝo esperis, ke la filino rapide forĝos la ĉevalon, kiun li kredis morta. Sed dum la tutaj tago kaj nokto la princino ne revenis en la kastelon. Do li ordonis al sia lignohakisto kontroli, ĉu la ĉevalo vere mortis, kaj kien malaperis la princino. Post tempeto tiu trovis la ĉevalon, kiu estis ligita apud la kabaneto, kie Ĵaki kaj la princino ankoraŭ profunde dormis. Li forkondukis ĝin al kaŝita groto kaj helpe de siaj kolegoj rulis gigantan rokon al la enirejo. Tutan tagon Liliana kaj Ĵaki vane serĉadis la ĉevalon en la arbaro. En la vespero de la dua tago Ĵaki diris al la princino:

– Ni serĉis ĝin du tagojn en la tuta arbaro. Ĉu rezigni? – Sed Liliana ne volis rezigni.

– Ni eksidu kaj pripensu: ĝi ne povas esti glutita de la tero!


– Sed jes ja! – ekkriis Ĵaki. – Ĉu vi ne memoras la groton en la mezo de la arbaro? Ni pasis antaŭ ĝi kelk-foje, sed ni ne enrigardis.

– Kompreneble ne – respondis la princino –, ja la enirejo estas fermita per granda roko.

– Tamen ĝi estas la sola loko, kie ni ankoraŭ ne serĉis ĝin. Ĵaki kunvokis amikajn bestojn el la tuta arbaro kaj per kunigitaj fortoj ili sukcesis forruli la rokon.

La ĉevalo pasigis teruran tempon en la groto. En plena tenebro ĝi povis palpi per siaj hufoj skeletojn kaj aŭdis la akran fajfadon de ratoj, kiuj certe atendis, ke ĝi mortu. Kiam finfine la amikoj malfermis la enirejon, ĝiaj okuloj estis blindigitaj pro la lumo.

Liliana tuj kun granda ĝojo kuris al sia amiko kaj saltis sur ĝian dorson. Sed la ĉevalo nur timis, ĉar ĝi ne rekonis la princinon, deĵetis ŝin kaj kuris for. Liliana kredis, ke la ĉevalo ne plu amas ŝin, ĉar ŝi kaŭzis tiom da suferoj al ĝi. Trista ŝi reiris hejmen, enŝlosis sin en sia ĉambro



kaj ploregis senĉese. La reĝo, kiu tre ĝojis pri la reveno de sia amata filino, ne kapablis konsoli ŝin. La sekvan tagon ŝi ne plu eltenis la grandan malĝojon, iris al la kastela lageto kaj ĵetis sin en la akvon por droni.

La reĝo vidis tion de sia balkono, kaj jam volis ekkuri al la lageto, kiam li vidis, de la alia flanko, alkuri la blankan ĉevalon! La reĝo vokis:

– Liliana ĵus dronis en la lageto!

Tiam la ĉevalo senhezite postsaltis en la akvon. Pasis longaj sekundoj ĝis ĝi reaparis ĉe la bordo kun

la senkonscia princino sur sia dorso. Nun la reĝo vere kuregis al ili ambaŭ kaj skuis sian filinon:

– Liliana, Liliana, ĉu vi ankoraŭ vivas?!

Tiam ŝi malfermis la okulojn kaj diris:

– Jes, paĉjo! Mia

ĉevalo! Mi amas vin ambaŭ!

La reĝo respondis:

– Ankaŭ mi amas vin ambaŭ.

De tiu tago la ĉevalo rajtis resti en la kastelo, kaj vivis ankoraŭ longe feliĉe kun princino Liliana.

Verkis: *Alice Larue (Belgio)*,
Anikó Hegedűs (Hungario),
Gretel Schumann (Francio)

Pied-notoj ĉi-apude ▶

Ĉu vi ŝatas fabelojn?

Ĉu vi aĝas malpli ol 14 jarojn?

*Se viaj respondoj estas jesaj,
ne preterpasu la okazon!*

Partoprenu en la Tut-monda Esperanta Fabel-konkurso!

Kultura-literatuta centro en Taivalkoski, Norda Finnlando, portas la nomon de *Kalle Päätalo* (1919-2000) eminenta finna verkisto naskiĝinta en Taivalkoski. En la jaro 1993, li iniciatis tut-landan fabelkonkurson por finnaj infanoj, kiu estas nuntempe la plej prestiĝa konkurso en Finnlando.

En la jaro 2000 la instituto aldonis al la konkurso Esperanton. En ĉi tiu jaro ĝi okazos, do, jam la 7an fojon.

Kategorioj:

A) por infanoj ĝis 8-jaraj, **B)** 9-10-jaraj kaj **C)** 11-13-jaraj.

Rimarko. La konkursaĵoj devas esti verkitaj originale en Esperanto de individuoj aŭ grupoj (ekz. de lernejoj klasoj). Individuaj kaj grupaj konkursaĵoj estos taksataj aparte.

La ĵurio aprezas precipe fabelecon kaj originalecon. La verko estu mallonga (1-5 folioj), ligita al la infana mondo, karakterizita de sorĉeco, mistero kaj supernaturaj okazaĵoj, kiuj kreas etoson fascinan al infanoj. Rakonto kun temo el la reala mondo, eĉ se lerte verkita, ne estas konsiderata kiel fabelo.

Daŭrigo sur paĝo 8 ▶

balkono: elstarajo ĉe muro, ĉirkaŭita de barajo / *giganta:* grandega / *gluti:* malaperigi ion tra gorĝo aŭ truo / *groto:* malvasta ejo en rokego / *hufo:* ungego de ĉevalo kaj kelkaj mam-bestoj / *kabano:* simplega dometo / *kastelo:* bela luksa domo / *kontroli:* detale esplori / *princo:* reĝido / *rato:* musego / *rezigni:* fordoni esperon pri io / *tenebro:* profunda mallumo / *trista:* malgaja.

E

LA

TRADICIOJ

Dieter BERNDT *de popoloj*

PASKA RAJDADO

En orienta parto de Germanio, proksime al la land-limo kun Pollando, vivas proksimume 60 mil soraboj aŭ luzaciaj serboj. Temas pri slava popolo, kiu ĝis nun flegas ne nur sian lingvon, sed ankaŭ malnovajn tradiciojn kaj kutimojn.

Unu el tiuj estas la „Paska Rajdado”. Ĉiu-jare Paskan Dimanĉon kunvenas multaj homoj de proksime kaj malproksime por persone ĉeesti neforgeseblan spektaklon. Temas pri la „Paska Rajdado”. Viroj, feste vestitaj, rajdas tra la regiono por alporti al la

najbaraj vilaĝoj la mesaĝon pri la resurekto de Jesuo Kristo. Ĉe la stratoj kaj vojoj miloj da homoj rigardas la festajn procesiojn. La „Paska Rajdado” estas ver-ŝajne la plej konata kutimo en la regiono. Ĉefe la katolikaj soraboj flegas tiun ĉi kutimon jam de kelkaj jar-centoj. Oni supozas la ekeston de la „Paska Rajdado” jam en la antaŭ-krista tempo. La tiamaj antaŭuloj, komence de printempo, perpiede aŭ surĉevale ĉirkaŭiris sian posedaĵon por tia-maniere protekti ĝin kontraŭ malbono. La alvenintaj slavoj

Sendu la konkursaĵon poŝte ĝis la **15a de septembro 2006** al la adreso: **Päätaalo-Instituto, Fabelkonkurso, PL 39, FI-93401 Taivalkoski, Finnlando**

Uzu kaŝ-nomon kaj menciu, ĉu temas pri grupo aŭ unuopulo. La nomo, adreso, naskiĝ-dato kaj (se eblas) telefonnumero aŭ ret-adreso de la konkursanto troviĝu en aparta fermita koverto.

Pli da informoj donas la komisiito pri la konkurso:

S-ino Aini Vääräniemi, Vääräjärventie 26 A, FI-93590 Vanhala, Finnlando
(Ŝia ret-adreso: aini.esp@pp.inet.fi)

Fabeloj, premiitaj en antaŭaj jaroj, estas legeblaj en:

<http://www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti/esperanto.htm>

La rezultojn oni publikigos sam-tempe kun tiuj de la finna konkurso, la **18an de oktobro**, kiam finnoj festas la tagon de **Satu** (finna vorto por fabelo). En ĉiu kategorio estas principe tri premioj. Unu el la gajnintoj de la unua premio ricevos ankaŭ la ĉef-premion **Fabelo Internacia**.

fascini: fortege kapti ies animon / originala: ne tradukita / prestiĝa: elstara kaj fama, vaste konata.


akceptis la kutimon. Laŭ malnovaj kronikoj oni scias, ke ekde la jaro 1490 ekzistis tiuj procesioj inter la urboj Hoyerswerda (Hojersverda) kaj Wittichenau (Vitiĥenaŭ). Iom poste Hoyerswerda fariĝis protestanta, kaj ĉar ili malaprobis la „Paskan Rajdadon”, la loĝantoj de Wittichenau devis serĉi alian partneron. Tial la viroj el Wittichenau ekde la jaro 1540 rajdas seninterrompe ĉiu-jare al Ralbitz (Ralbic). Inter tiuj lokoj okazas la plej grandaj procesioj, en kiuj partoprenas ĝis 400 rajdantoj. Paskan Dimanĉon en la regiono ekiras naŭ procesioj tra entute 30 lokoj. Ĉiu procesio komenciĝas per komuna preĝado. Kiam la nigre vestitaj viroj ekprenas la krucon kaj la preĝejajn flagojn ili ekrajdas po-duope. Kiu partoprenas en ĝi la unuan fojon, montras tion per mirta kroneto sur sia jako. Je la 25a partopreno ili havas arĝentan insignon kaj je la 50a partopreno oran. Ankaŭ la ĉevaloj estas bele ornamitaj.

Kiam iu procesio ekiras al la najbara loko, sam-tempe ekiras de tie procesio al kontraŭa direkto. Sed la rajdantoj pasas laŭ diversaj vojoj, ĉar ili ne devas renkontiĝi dum-voje. Dum la rajdado la viroj kantas kaj preĝas en soraba lingvo. La procesio de Wittichenau estas la unu-sola du-lingva. Tie oni aŭdas ankaŭ la germanan lingvon. Post kelk-jara interrompo, ekde la jaro 1993 oni revivigis la „Paskan Rajdadon”. Nun denove ĉiujare rajdas kantantaj kaj preĝantaj viroj tra la lokoj de la regiono.



kroniko: kolekto de historiaj okazaĵoj / *mesaĝo:* parola aŭ skriba informo / *mirta:* floro uzata por flor-kronoj / *Pasko:* religia festo de printempo / *protestanto:* Luterano aŭ Kalvinano / *procesio:* festa marŝo / *resurekto:* releviĝo el tombo / *spektaklo:* publika prezento.

*Sorabinoj
en tradiciaj
vestaĵoj*



*Ĉu vi povus rakonti al ni pri iu el viaj tradiciaj kutimoj?
La legantoj atendas vian kontribuadon. Ne prokrastu ĝin!*



- Mi petas la doktoron.
- La doktoro ne estas hejme.
- Dankon. Tamen, mi volas scii, kun kiu mi parolis?
- Kun lia papago, kiu estas hejme.

humuro


de **Jadranka Mirić**
Serbio

Instruisto demandis lernanton, kiu longe forestis:

- Ĉu vi resaniĝis?
- Jes –, respondis la lernanto.
- De kiam vi forestis la lernejon? – demandis la instruisto.
- De tiam, kiam Hanibalo transiris Alpoj – respondis la lernanto ridetante.

Junulo ludas rok-muzikon kaj demandas al la patro:

- Paĉjo, ĉu vi iam aŭdis ion similan?
- Jes, antaŭ tri jaroj, kiam mi donacis al vi gitaron.
- Sed tiam mi ne sciis muziki...



Du puloj interparolas antaŭ teatro:


- Kiel ni iros hejmen, ĉu per buso aŭ per hundo?

Alpoj: la plej alta montaro de Eŭropo inter Italio kaj Aŭstrio, Svislando / Hanibalo: fama Kartaga militestro / pulo: sango-suĉa fiinsekto.

KIUJ DIFERENCOJ INTER KAMELO KAJ DROMEDARO?

Ili fizike malsamas unu la alian pro tri ĉefaj detaloj: la nombro de ĝiboj, la alto kaj la har-tipo.

DROMEDARO



- La plej videbla diferenco estas sur la dorso: kamelo estas du-ĝiba kaj dromedaro estas unu-ĝiba.
- Alia diferenco estas la alto: kruroj de kamelo estas pli mallongaj ol tiuj de dromedaro.
- La tria diferenco estas la haroj, kiuj ĉe kamelo estas multe pli longaj ol ĉe dromedaro.



KAMELO

Krome, ilia kutima restadejo malsamas. Ambaŭ devenas de komuna praulo, kiu vivis en Norda Ameriko antaŭ 40 milionoj da jaroj, sed nun ili vivas en malsamaj regionoj de nia planedo.

Ni povas trovi la kamelon nur en Centra Azio kaj la dromedaron – ankaŭ konatan kiel araban kamelon – ne nur en parto de Azio, sed ankaŭ en Afriko. Tiuj du remaĉantaj mamuloj estas la solaj specoj de la familio *Camelidae* kaj helpas la homon kiel transport-rimedoj en dezertaj regionoj.

Dromedaroj povas atingi 16 km/h. Dume, kameloj pied-iras pli malrapide: ĉirkaŭ 5 km/h. Kompense, kameloj kapablas porti pli pezajn ŝarĝojn.

Komune, ambaŭ kapablas resti sen trinki akvon dum pluraj tagoj. Oni jam registris kazojn de tiaj mamuloj, kiuj tenis sin dum 17 horoj sen eĉ akvo-guto!

Evandro de Freitas, Brazilo

ĝibo: bul-forma elstar-aĵo sur la dorso/ **maĉi:** diserigi per dentoj / **planedo:** ĉiel-korpo kiel nia Tero, ekzemple / **struto:** grandega birdo de dezertoj, kiu ne flugas / **tipo:** eco de similaj kvalitoj, kompare al malsimilaj.

Solvo de cifera enigmo (n-ro 114)

4	2	5	6	3	1	8	7	9
3	7	6	5	9	8	1	4	2
8	1	9	7	4	2	6	3	5
1	9	8	3	7	5	2	6	4
2	6	3	9	8	4	7	5	1
7	5	4	1	2	6	9	8	3
5	4	7	2	6	9	3	1	8
9	3	1	8	5	7	4	2	6
6	8	2	4	1	4	5	9	7

Silabo-enigmo (p. 15): 1. sin-ko-po, 3. ta-ba-ko, 5. gu-to, 6. me-li-so, 8. pat-ro-no, 9. la-do, 10. ro-ma-no, 11. A-mo-ro.

Enigma parabolo (p. 15): Ĉar li dormis dum deĵoro.

Testo (p. 39): 1. C, 2. C, 3. B, 4. A, 5. Ĉ, 6. A, 7. Ĉ, 8. B, 9. C, 10. C, 11. C, 12. Ĉ.

IOM pri MUZIKO

Rubriko de Marielen, Francio

Grava dat-reveno de muziko

Ĉi-jare ni festas prestiĝan datrevenon : **Wolfgang Amadeus Mozart** naskiĝis antaŭ 250 jaroj. Por multaj el ni, Mozart signifas nur klasikan muzikon, iom tedan, kiun foje aŭskultas la gepatroj, sed tion ne volonte aŭskultas gejunuloj, krom klasikemuloj.

Nu, ĉu ni vere konas Mozarton ? Provu arigi la diversajn informojn, kiujn vi aŭdis pri li : ni scias tre malmulton.

Fakte li estis tute eksterordinara homo, natur-dotita por muziko: en la tre muzikema familio Mozart, la knabeto havis okazon ludeti per la klavico de la fratino, post kiam li fariĝis tri-jara. La patro mem estis tre fama muzikisto kaj rapide organizis turneojn tra Eŭropo kun siaj infanoj. Tiam la kvin-jara Mozart riveligis kiel eksterordinara klavisto. Kiam sep-jara,



li eldonas siajn unuajn komponaĵojn. Dum siaj vojaĝoj li renkontis Johan Christian Bach, Haydn, kaj aliajn komponistojn kiuj influis lin kaj helpis starigi tiun unikan talenton.

Oni ofte akuzis Mozarton, ke li komponas brilajn kaj sensignifajn muzikojn por akiri monon kaj influon, sed ĉiuj komponaĵoj estas fakte multe pli profundaj ol oni ofte kredas.

Li senĉese komponis dum la tuta vivo, eĉ en la lito, kelkajn tagojn antaŭ la morto. Malsano kaj mizero mortigis lin en lia 35a jaro. Oni povas nur imagi kiom da ĉefverkoj nun ekzistus, se tiu genio plu vivus kelkajn jarojn !

En Francio ĉi-jare, aperis la tuta verkaro de Mozart en Kompakt-diskoj (KD): ĝi okupas entute 170 diskojn ! (Mozart, l'intégrale)



akuzi: nomi iun kulpa / **doti:** provizi iun per ĉio utila kaj necesa / **genio:** eksterordinara kapablo / **influi:** efiki sur iun / **klavico:** speco de kord-instrumento / **KD = CD** / **klavo:** prem- aŭ tuŝ-butono, -plateto / **komponi:** verki muzikon / **riveli:** malkovri ion nevideblan / **teda:** neinteresa, ĝena / **turneo:** rond-vojaĝo de art-grupo kun haltoj kaj art-prezentoj / **unika:** ne havanta alian similan.

Jen la solvoj de nia lasta kvizo-ludo (n-ro 3/05)

A: 1. trajno/vagonaro, tramo, biciklo, motorciklo, aŭto(mobilo), (aŭto)buso, trolebuso* 2. stirilo, pedaloj, selo, bremsoj, framo, dent-radoj, ĉeno* 3. surteriĝis, ekflugos, estas. 4. por defendi sin, por reguligi trafikon, disigi malobeantojn 5. ...malŝalti ... antaŭ ol elaŭtiĝi. 6. pli, la plej

B: 1. boato, (vel)ŝipo, pramo, flosa, akvobiciklo, jaĥto, barko* 2. stirilo, stirejo, stiristo, stirado, telestiri, stir-stango* 3. migranta etvendisto 4. trafik-lampo, kabloveturilo, grimptramo, puŝ-mildigilo, rul-ŝtupetaro, portebla lito por malsanuloj 5. a) ternivela transpasejo por piedirantoj, b) antaŭa aŭtovitro 6. Post malfeliĉo, nehaltigeble sekvas aliaj malagrablaĵoj.

La plej lertaj solvintoj de la decembra n-ro

(Redaktis kaj korektis: Saliko, Finnlando)

Kategorio A

1. Małgorzata J. Komarnicka (PL) 20 p.

2. Neringa Vitauskaite (LT) 18 p.

Kategorio B

1. E. E. Popoviciu (RO) 19 p.

Lenĉe Efremova (MK) 19 p.

2. Mária Molnár (HU) 18 p.

Grupoj:

Klubo Mlada Boleslav (CZ) 19 p.

Grupo Marijampole (LT) 18 p.

Post tut-jara konkurso gajnis

Kategorio A

1. Vitauskaite, Neringa (LT) 56 p.

Grupo Marijampole (LT) 56 p.

2. Komarnicka, Małgorzata (PL) 39 p.

Kategorio B

1. Efremova, Lenĉe (MK) 55 p.

2. Grupo Totoraitis (LT) 54 p.

3. Molnár, Mária (HU) 51 p.

Gratulon kaj dankon al ili ĉiuj!

* Ekzistaj pluraj ĝustaj solvoj

Pro malkreskanta interesiĝo al la kvizoludo ĉesas tiu ĉi rubriko. Se vi deziras ĝian revivigon informu la redaktorojn (adresoj sur paĝo 4).

Koran dankon al ĉiuj, kiuj partoprenis en nia kvizoludo!!!

Ĉu vi scias...

1. Kie kaj kiam estiĝis la unua ŝtato de la mondo?
2. Kiu iniciatis la Internacian Ruĝ-krucan Servon?
3. De kie venas la vorto 'Biblio'?
4. Kiel nomiĝas la preĝejo de judoj?
5. Kion signifas la vorto 'koncentrejo'?
6. Per kiaj rimedoj batalis Mahatma Gandhi kontraŭ la brita koloniismo?
7. Kiel nun nomiĝas la iama Persio?
8. Kiel nomiĝas la fasto-monato de mahometanoj?
9. Dank' al kies propono ekestis la konata signo @ de la elektronika poŝto?
10. Kio funkciigas la unuajn meĥanikajn horloĝojn?

Zoltan KURUCZ, Hungario

(Solvoj kaj piednotoj sur paĝo 46)

AMERIKAJ LEGENDOJ

Kompilis Jozefo de J. Campos Pacheco, Kubo

La indianoj, kiuj loĝis en Ameriko antaŭ la konkero de la hispanoj, tre amis siajn birdojn. Por la indianoj iliaj belaj flugiloj valoris pli ol oro kaj arĝento. Inter la birdoj, kiujn la amerikaj indianoj pleje amis, estis kecalo kaj kondoro. Kecalo estis preferata birdo de kiĉeoj, kiuj loĝis en Gvatemalo. La alia birdo, kondoro, loĝis kun la keĉuoj, indianoj de Andoj, en Peruo kaj Bolivio.

Multaj belegaj legendoj parolas pri tio, kiel naskiĝis kecalo kaj kondoro. Legi ilin estas kvazaŭ babilo kun la indianoj mem.

KECALO

José Martí – la kuba nacia heroo – parolis pri kecalo jene: „Kecalo estas la belega birdo de Gvatemalo, la bril-verda birdo kun longaj flugiloj, kiu mortas, se iu enkaŝigas ĝin aŭ se ĝia flugilo rompiĝas aŭ vundiĝas.”

Pri tiu belega birdo estas legendo, kiu rakontas pri kuraĝa knabo, admirata kaj amata de sia tribo. Pro tio, li fariĝis tribestro kaj la saĝulo de sia popolo, la kiĉeoj, kiuj antaŭdiris, ke li estos nemorti-deva kaj vivos eterne.

Sed tiu junulo havis malamikon, kiu volis fariĝi tribestro, sed ne povis ĝis la morto de la junulo. Iun tagon, li surprizis la junulon en la arbaro kaj pafis al li sagon per sia paf-arko. La sago traboris la bruston kaj li falis kun la brusto ruĝigita de sango sur la verdan herbaron, kiun la suno briligis.



Kiam la tribanoj trovis lin, li jam ne estis la junulo, kiun ili konis, sed bela verda birdo, kiu ege brilis. La koloron donis al li la herbaro, sur kiun li estis falinta. Nur la brustaj plumoj estis ruĝaj pro la sango, kiu ŝprucis el la vundo. La longa vosto de la birdo havis la kolorojn de iriso, donaco de la suno, kiu brilegis tiun tagon.

Tiel kiĉeoj rakontas la naskiĝon de kecalo. Ekde tiu tago ĝi estas la simbolo de tiu popolo kaj aperas en la ŝildo kaj mono de Gvatemalo.



Pri kondoro vi povos legi en la sekva, septembra numero de nia revuo.

indiano: praloĝanto de Ameriko / konkero: militakiro / legendo: rakonto pri io pratempa.

SILABO-ENIGMO

de Dieter Berndt

1	2			3		4
5			6	7		
		8			9	
10				11		

En ĉiujn kvadratojn skribu ĉiam po unu si-la-bon.

HORIZONTALALE →

1. Subita forta sveno
3. Materialo por fumado
5. Ero el fluaĵo
6. Aroma vegetaĵo
8. Sanktulo, kiu protektas urbon aŭ preĝejon
9. Plato el metalo
10. Literatura verko
11. Dio de amo

VERTIKALE ↓

1. Gramatika nombro
2. Malpuraĵo
3. Trink-vazo
4. Parto de loĝejo
6. Mezur-unuo
7. Vegetaĵo uzata por fari tolon
8. Bakita manĝaĵo
9. Besto en Suda Ameriko

ENIGMA PARABOLO

En iu mateno skipo de gardistoj finis sian deĵoron kaj disiris hejmen. Unu el ili, maltrankvila, male kuris en la palacon kaj petis, ke la reĝo aŭskultu lin.

Kiam la reĝo akceptis la gardiston, li rakontis pri terura okazaĵo, kiun li songis ĉi-nokte: „Mi vidis vin veturi laŭ la kutima montara vojo, kiam subite de alta roko falis granda ŝtonego, kiu frakasis la ĉaron!”

La reĝo ordonis sendi malplenan ĉaron laŭ la kutima vojo, kaj li mem veturis laŭ la ĉirkaŭa.

Kaj vere, kiam la ĉaro atingis la altan rokon, de sur ĝi falis ŝtonego kaj frakasis ĉion je ligneroj.

La reĝo mirigita kaj kontenta gratulis la aŭgurinton, donis al li grandan premion kaj maldungis lin.

Demando: Pro kio la reĝo premiis, tio estas klara, sed pro kio li maldungis lin? (Solve sur paĝo 11.)

Lusi Rimon, Israelo

aŭguri: antaŭdiri / parabolo: simbola instrua rakonto.



ILUSTRITA FRAZELOGIO


„Ilustrita frazeologio”, la libro de *Sabine Fiedler* kaj *Pavel Rak* enhavas multajn tre utilajn parol-turnojn. Mendebila ĉe eldonejo KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice (Prago), Ĉeĥio. (Rete: info@kava-pech.cz, TTT-ejo: www.kava-pech.cz).

Ĉi-foje ni prezentas al vi frazeologiaĵon:

Balai ion sub tapiŝon

Klarigo:

Kaŝi aŭ ne trakti temon; forpreni ĝin el la tag-ordo; ne fin-diskuti ĝin, ĉar ĝi estas mal-ŝatata aŭ komplika.



Ekzemploj:

- La aŭtoro ofte atentigas redaktorojn de periodaĵoj pri erara lingvo-uzo, por ke en sekva numero ili faru ĝustigojn. Sed – li plendas – „anstataŭ danki min, la plej multaj kutime strut-maniere kaŝas sian kapon en paper-korbo aŭ *balaas la erarojn sub la tapiŝon*, kie ili ŝime kaj putre akumuligas kaj stinkigas la tutan redakciejon.” (ESPERANTO 1/96: 18)
- Ĝis nun miaj bon-intencaj konsiloj por plibonigi la kvaliton de la periodaĵo estis senkomente *forbalaitaj sub la tapiŝon* de la redaktejo. (MONATO 8/96: 6)
- Eŭropa Unio ĉiam *balaas nian proponon oficialigi Esperanton sub la tapiŝon*, dirante ke la cirkonstancoj ankoraŭ ne maturiĝis aŭ ke renversi la nunan sistemon bezonus grandegajn elspezojn.
- Li neniam konsideris niajn proponojn, sed – sen ajna kritiko – *balais ilin sub la tapiŝon*.

cirkonstanco: akompanaj eventoj de agado, situacio / *frazeologio:* esprimo propra al iu lingvo / *komplika:* malsimpla / *stinka:* malbonodoraĉa / *trakti:* pridiskuti temon.



KONSTRUU VORTOJN!

ero > tero > utero > butero

Tiu ĉi simpla ludo deziras helpi al vi memor-fiksi kelkajn novajn vortojn.

Kiel ludi?

• Elektu tre mallongan vorton kiel, ekzemple, *ano*, kaj poste, aldonante al la komenco po unu literon, venu al novaj senco-havaj vortoj. Ĉi-okaze mi povis fari jenajn vortojn:

lano, bano, kano, mano, fiano, sano, pano, nano, rano, dano, ĉano, vana

Ĉiu el ili valoras **1** poenton (sume: 12).

• La sekva paŝo estas pli malfacila. Provu aldoni al la supraj vortoj unu plusan literon por denove veni al nova vorto. Mi povis plu-formi nur ĉe tri vortoj:

elano, plano, lvano, lrano, krano, brano

Por ĉi tiuj vortoj ĉiu ricevas po **2** poentojn (sume: 12).

• La daŭrigo estas la sama, sed ĉiu nova vorto nun valoras **4** poentojn. Mi sukcesis fari jenajn:

divano, tirano, ekrano (sume: 12).

• Se vi povas pluiri (mi ne povis), vi ricevos por unu vorto **8** poentojn.

Fine, ĉiu adicias siajn poentojn. Ĉi-foje mi akiris entute: **36** poentojn.

Konsilo. La ludantoj mem decidu, kiel longe konstrui vortojn. Mi proponas 5 minutojn. Krome, mi proponas al vi akcepti ŝanĝon de finaĵoj: *o, a, i, e* (kiel *vana* ĉi-supre).

Se vi permesas, mi rekomendas al vi kelkajn vortojn por ekiri: *ero, ulo, ino, oro, ia, mi, ni, aŭdi, nu, aĝo, ono, alo, avo, iri, ilo, odo, ordo*.

Vorto-kreemon deziras:

Geza Kurucz

*Nikolai KURZENS**

Necesas

Necesas io granda, io tia,
ke ni ne devu pro la vivo honti,
ke ni fiere povu poste montri:
ne estis tamen vana vojo nia.

En ĉarma bel', en varmo idilia
la Grandon vane volus ni
renkonti;
necesas alte super tio monti –
en venta fajr', en malkvieto kria.

Necesas ĵeti sin al fajr' infera,
por esti io pli ol vermo tera,
rampanta al la fin' kun laca treno.

Necesas plor' de malespero muta,
necesas hor' ekstaze fajro-sputa,
kaj paradiz' necesas kaj geheno!



* *Fama latva esperantisto, ŝtat-oficisto, poeto, kunlaboranto, interalie, de „Literatura Mondo” en la 1930aj jaroj.*



ekstaze: malmilde / idilia: tute senzorga, ideale favora / geheno, infero: malo de ĉiel-lando (paradizo), postmorta loko por mal-bonuloj / sputi: rapide eligi salivon el buŝo / treni: tiri post si pezaĵon.

Ni gratulas s-ron
Denis A.C.Conrad
el Brazilo,
kiu senerare solvis nian
ciferan enigmon (vd. p. 13).

LUME

LA UNUA MIRINDA ETAĜO



Rubrikestro:
Mónika Molnár

Gepatroj, instruistoj:
bonvolu legi ĉi tiujn
paĝojn al etuloj kaj
helpi al ili ĝui ilin!

Saluton, kara mia amiko!



Mi tre ĝojas, ke vi venis viziti min. Kaj pardonu min, ke mi tuj ĝenas vin, sed mi bezonas urĝan helpon, kaj vi ŝajnas al mi tre kapabla por helpi. Ĉu mi povas kalkuli je via afabla helpo?

Ho, jes, permesu al mi prezenti min: mi estas Ulo.

Kaj ili estas miaj amikoj:



Kaj ankoraŭ multaj, multaj aliaj, kiuj same nomiĝas Ulo... Ĉu vi jam divenis mian problemon? Jes, ni estas tre similaj, sed tamen, tute ne la samaj personoj! Ni ĉiuj havas propran karakteron, kaj laŭ tiu karaktero ni ŝatus iom ŝanĝi, precizigi niajn nomojn. Jen por kio mi kaj ni ĉiuj bezonas vian helpon!

Kompreneble tio estas tre granda laboro, sed ne timu, mi ne lasos vin sola, mi akompanas kaj helpas vin en la granda elektado.

La unua granda tasko estas serĉi «A-vortojn»!

Kion vi diras? Ĉu vi ne scias, kiuj estas la «A-vortoj»?


Jes, certe vi konas ilin! Ili estas la vortoj, kiuj respondas al la demando «KIA?» kaj kies lasta litero estas «-A».

Ni vidu kelkajn ekzemplojn:



Ho, mi iom laciĝis dum tiu serĉado. Jen via vico!

Bonvolu ankaŭ vi serĉi kelkajn «kiA-vortojn» kaj enskribu ilin!



Bone! Tre tre bone! Mirinde! Jes, mi sciis, ke vi ne forlasos min!

Nun ni vidu la konkretajn nomojn:



Li estas tre
eleganta,
do li estu...
ElegantUlo!

Kaj li ŝajnas
esti tre
kontenta, do
li estu...
KontentUlo!



Kaj jen, rigardu, sur la sekva paĝo ĉiuj venas por peti nomon de vi. Ili vidis, ke vi estas tre talenta, do ek al la laboro!

Mi estas
FortUlo, ĉar
mi estas tre
forta!



Sed mi, mi tute ne
estas forta... Mi estas
eĉ tre MALforta.
Jes, mi estas
MalFortUlo.




Mia nomo estas
.....

Mi estas
.....



Mi estas
.....




Mi nomiĝas
.....

Kaj mi ha-
ha-ha, mi
nomiĝas
.....





Nomu min
simple
.....



Mi ne fartas tre bone,
mi estas

Mia nomo
estas



Se vi bezonas helpojn solvi
la taskojn, rigardu en nia
hejmpaĝo ĉe <lernu.net>!

LUDE


LA UNIKA DUA ETAGO



ALUMETA ALIMETO


TASKO 1:

Jen tri trianguloj.
Transloku du alumetojn,
tiel ke vi formu kvar
egale grandajn triangulojn.




TASKO 2:

Jen NAŬ rektanguloj, formitaj
el dudek unu alumetoj. Forprenu
SES alumetojn, tiel ke restu SES.




Jen respondoj al la enigmoj sur paĝo 22 de numero 2005/3:

1. La tri trianguloj: Movu la trian
triangulon sub la aliajn, por formi kvar
egal-laterajn triangulojn.



2. La kalkulo: Movu la supran alumeton de la egalo-signo (=)
al la supro de la minus-signo (-). Do, la egalo-signo
fariĝas la minus-signo kaj la minus-signo fariĝas egalo-
signo. Tiel, la kalkulo (ekvacio) fariĝas ĝusta.




Unu minus tri egalas du.

3. La naŭ steloj: Jen kiel desegni kvar rektajn liniojn
por konekti la stelojn. Neniu diris, ke la linioj devas
resti ene de la mezuroj de la stelaro.




Jen ekzemplo de problem-solvado, kiun oni faras
vidante pli grandan kuntekston de problemo. Oni
nomas tian solvodon *pensado ekster la kesto*.

4. Tri linioj el ses steloj




Kiel formi tri tri-stelajn liniojn el
nur ses steloj? Formu triangulon!

KORPA KRUCAJO



HORIZONTALALE →


11. Komenci
12. La sepa planedo
16. 'Li saltis ___ sia haŭto.'
20. 'Ni vidis modestan, _____ bonigon en via san-stato.'
24. Mi havas _____ amikon. Pli ol du metrojn!
27. „_____ viajn manojn en la banĉambro.
29. „Via pezo kreskos, ĉar via apetito estas kiel tiu de la reĝo de la bestoj – ĝi estas _____.”
30. Protekta konstruita muro, ekzemple ĉirkaŭ ĝardeno aŭ domo.
32. Sur vizaĝoj de adoleskuloj (14-19-jaraj junuloj) ni ofte vidas _____. Ruĝajn punktojn.



34. Harmonia bruo. 'Kia estas la ____ de unu mano aplaŭdanta?' – Zen-demando.
 35. 'Li havas _____ piedojn. Ili ne estas etaj.
 39. Ofte Observataj Ĝermoj (mallongigo).

VERTIKALE ↓

2. Fosaĵo (R)
 3. 'Ekzercu pli ofte, ____ du kilometrojn tage!'
 4. Konstruaĵo kiu permesas al vi transiri riveron. Aŭ konstruaĵo en via buŝo kiu ligas kelkajn dentojn.
 5. Ĉu vi opinias ____ vi havas fortan korpon?
 10. Homa pezo super 140 kg. ne estas ____.
 14. Venu ____ la parko kun mi.
 19. Sanigaj Legomoj (mallongigo)
 21. Tipa rusa vira nomo. (R)
 25. Membron.
 26. Malalta persono.
 28. En la apuda bildo aperas la _____ de viro. (R)
 31. Moviĝanta akvo-muro ĉe plaĝo. Aŭ, revuo el Kaliningrado: La _____ de Esperanto.
 36. Sufikso por grupo.
 37. " ____ via sano!"
 38. Aŭtomobil-ŝildo el Nederlando.



Jen kruc-enigmo pri korpo-partoj. Multaj helpiloj aperas en vortoj, kiel en kutima kruc-enigmo.


Sed kelkaj aperas kun numer-indikoj kaj sagoj ĉe la du bildoj. Solvu la enigmon kaj la sekretan frazeton. Sendu al ni la solvon por la suba frazeto rete aŭ poŝtkarte – eble vi gajnos premion! Solvo en la sekva numero kaj en la retpaĝo.

Sekreta frazeto

Kiun bonan konsilon donis al ni la romianoj pri nia temo? Metu la literojn en la kvadratojn laŭ la krucenigmaj numeroj por trovi la respondon.



34 14 10 21




13 16 33 34 39



11 26



19 36 38 25



7 31 30* 6 18

* uzu la trian literon de ĉi tiu vorto.



Saluton, hodiaŭ mi volas instrui al vi kiel kuir.



...kaj mi volas instrui al vi kiel kanti kune. Ni improvizos versojn.



Ĉu ne pli bone ke vi kantu post kvar monatoj? Nun vi helpu al mi instrui kuiradon.

Mi ne volas instrui kuiradon. Mi ne povas kuir.



Do, aŭskultu mian lecionon. Vi lernos de mi.

Ne, mi ne volas lerni la kuiradon. Mi volas kanti – nun. Vi kuiru, mi kantu... ...samtempe.

Hmm. Ni vidu. Do, karaj legantoj, provu ĉi tion hejme. Prenu ses ovojn, du karotojn, fromaĝon, raspilon kaj poton...



*Ses ovoj en la pot'
Sen demandi pri la aĝo
Pecetojn da karot'
Miksu kun kuraĝo!
Per raspila frot'
Aldono de fromaĝo!
Jen la manĝo pretas
Gustumi ĝin mi petas!*



Ha. amuze.
lom. Nun, la
venonta paŝo
- krem-saŭco.
Prenu kremon
kaj vipilon...

*Kremon nun ni vipas
Ne pro miskonduto
Leka prov' ĉe-lipas...*



*...Se dum la frand' misgluto
Mi firme anticipas
Makuliĝon de surtuto!*

Hmm, tre
bongusta!

BURP!
Ups!

Malamuza
kanto! Nun
kritika paŝo.
Ni tranĉas
cepojn. Faru
zorge!



*Cepo-tranĉa pret'
Ne eblas plan' sen
Risk' de ĝia sket'
De telero planken
Atendeblas fiasket'*



Ernio! Vi ner-
vozigas min!
Ne kantu pri
akcidentoj.
Alie mi **zjupp!**
fuŝos.

Vidu, tiu fuŝo
estis via kulpo!
Foriru, kanti en
alia paĝo de la
revuo. Elektu
paĝon el la
parto de Geza!

*La versa mok' lin ĝenas
Sed per ver' la rimo plenas*



BAF! Jen la pajlero kiu
rompas la dorson de la
kamel! La guto kiu
troplenigas la glason!
PATATAKI!



*Multi-utila estas pato
Uzita sen kompato
Sur kap' kaj pat' malglato
Jen kantista fato.*



Interkultura

Rubrikestro: Elena Nadikova,
Lernejo/Ŝkola 55, Klaso 7 A,
str. Leninskogo Komsomola 54,
RU-428037 Ĉeboksari, Rusio.
lena_espero@mail.ru.



Karaj amikoj! Ni ĝojas denove saluti vin sur la paĝoj de nia rubriko *Interkultura mondo!* Ĝi iĝis jam unu-jara kaj povas festi sian unuan naskiĝtagon!

Dum la pasinta jaro nia rubriko rakontis al vi pri la internacia projekto *Interkulturo*, konigis al vi la grupojn en la projekto kaj prezentis iliajn materialojn. Kune kun la revuo ni vojaĝis tra Rusio, Ukrainio kaj Hindio kaj konatiĝis kun iliaj loĝantoj kaj ilia vivo. Dankon al la grup-gvidantoj kaj grupanoj de Verda Junularo kaj SEA Klubo 'SAI SARANATH' pro la kontribuoj! Pro la unua "naskiĝtago" de nia rubriko al ni estus interese, karaj legantoj, ekaŭdi vian opinion pri ĝi. Ni estos dankemaj pro ĉiuj rimarkoj kaj deziroj!

Ĉi-jare ni volas daŭrigi tiun ĉi tradicion kaj prezentos al via atento novajn materialojn pri nia *Interkultura Mondo*. Se vi volas 'malfermi' al la mondo vian grupon, landon, kulturon kaj vivon – ni invitas vin rakonti pri ili sur la paĝoj de *Juna amiko*. Do, bonvenon al la senlima *Interkultura Mondo!*

Hodiaŭ ni vojaĝos al Tajvano! Tajvano estas bela insulo, troviĝanta en mara areo, inter la Sud-Ĉina kaj Orient-Ĉina maroj. Por kompari, ĝi estas simile granda kiel la insulo Sardinio. La ĉefurbo estas Tajpeo, internacia kaj moderna urbo, kie loĝas homoj de multaj diversaj naciecoj.

La klimato estas tropika kaj tial ekzistas ĉefe du sezonoj: somero kaj vintro. Sed ambaŭ sezonoj estas mildaj. Kreskas multaj fruktoj kaj legomoj, inter kiuj iuj estas maloftaj. Tajvano estas vera paradizo por vegetaranoj, ĉar ĉi tie eblas facile trovi manĝejojn, kiuj estas vegetaraj aŭ havas vegetarajn manĝojn.

Tajvano estas ankaŭ fama turisma loko kaj oni ofte resumas la karakteron de tajvanaj pejzaĝoj per "belaj montoj, densaj arbaroj, multaj akvofaloj,

mirindaj bordoj". Vere, sur la insulo eblas vidi diversajn montarojn, montetarojn, ebenaĵojn, basenojn, riverojn, lagojn kaj akvofalojn.



Tajvano havas loĝantaron de 22 milionoj. En la insulo loĝas diversaj popoloj; okazis granda ĉina enmigro en la jaroj post la dua mondmilito. Sed ankaŭ estas diversaj indiĝenaj popoloj, kiuj jam de tre multaj jaroj antaŭe loĝas ĉi tie kaj havas kutimojn, kulturon kaj lingvon tre malsamajn ol tiuj novaj venintoj.

Esperanto en Tajvano ne havas longan historion, kaj estas fakto ke ĉiam la movado en tiu ĉi regiono dependis de eksterlandanoj. Nuntempe ekzistas dekoj da esperantistoj tra la insulo kaj kelkaj kursoj de diversaj niveloj. Plej multe da esperantistoj kaj kursoj troviĝas en la suda urbo Ping Tungo (Pindongo), kie ankaŭ estas oficiala kurso de Esperanto en granda mez-alta lernejo Ping Rong. Nun en la kurso studas 24 studentoj kaj ili lernas la lingvon dum du semestroj.

Do, konatiĝu! Grupo de Reza KHEIR-KHAH

Urbo: Ping Tungo, suda Tajvano. Grupanoj: 24

Sekvas la sin prezentoj de kelkaj el la grupanoj.

Vizitu la hejmpaĝon Interkulturo! Vizitu la kvizojn, la forumon kaj la sin-prezentojn. Anoncu vian grupon. Aŭ aliĝu kiel unuopulo. Komparu vian vivon kaj interesojn kun tiuj de aliaj grupoj en aliaj landoj kaj kulturoj. Malkovru la diferencojn inter vi, kaj trovu ankaŭ tion, kio estas inter vi komuna!

www.interkulturo.net

Abonu al Juna amiko por 2006 !

	1 ekz.	Ekde 3
Tarifo 1	€ 14	po € 11
Tarifo 2	€ 9	po € 7

Vizitu la hejmpaĝojn de ILEI www.ilei.info kaj trovu paĝaron de *Juna amiko* en la biblioteko de www.lernu.net. Tio montras al neabonantoj kion ofertas nia revuo – estas kreskanta stoko da artikoloj. Konvinku viajn amikojn aboni nun!

Mia nomo estas **Eileen**. Mi estas 16-jara. Mi loĝas en la sudo de Tajvano. Mi havas 2 fratinojn. Miaj hobiaj estas aŭskulti muzikon, rigardi televidon, legi librojn.

Mia nomo estas **Jessie**. Mi estas 17-jara. Mi estas knabino. Mi estas studento. Mi havas 2 fratojn. Miaj hobiaj estas rigardi televidon, aŭskulti muzikon kaj butikumi. Mia revo estas vojaĝi tra la mondo.

Mia nomo estas **Fish**. Mi estas 15-jara. Mia favorata stud-objekto estas la angla lingvo. Miaj hobiaj estas rigardi korbopilkon, televidon kaj retumi.

Mia nomo estas **Satarno**. Mi estas 16-jara. Miaj hobiaj estas vojaĝi, butikumi kaj aŭskulti muzikon.



Mia ĉina nomo estas **Shi yu-yu**. Mia esperanta nomo estas **Purina**. Mi estas 16-jara. Mi havas unu fraton kaj unu fratinojn. Miaj hobiaj estas rigardi korbopilkon, filmojn kaj aŭskulti muzikon.

Mia nomo estas **Sun**. Mi estas 15-jara. Mia plej ŝatata stud-objekto estas la angla. Miaj hobiaj estas retumi, rigardi televidon kaj korbopilkon.

Mia nomo estas **Betty pan**. Mi naskiĝis en 1989. Mi ŝatas rigardi filmojn.

Mia nomo estas **Glor**a. Mi estas 16-jara. Mi havas unu fraton kaj unu fratinton. Miaj hobiaj estas historio kaj butikumado. Mi ŝatas ankaŭ ludi en komputilo, retumi kaj aŭskulti muzikon.

Mia nomo estas **Amika**. Mi estas 16-jara knabino. Mi havas du fratinojn. Miaj hobiaj estas butikumi kaj retumi. Mi ŝatas katojn.

Mi nomiĝas **Angela**. Mi havas 17 jarojn. Mia ŝatata leciono estas komputiko. Hobiaj: rigardi basbalon, rigardi televidon kaj filmojn. Mia revo: vojaĝi tra la mondo kaj korespondi kun aliaj. Mi havas du fratinojn.

Mia nomo estas **Klara**. Mi estas 16-jara kaj havas du fratinojn. Miaj hobiaj: ludi en komputilo, retumi, aŭskulti muzikon kaj butikumi.

Mi nomiĝas **Debbie**. Mi havas 15 jarojn. Mia ŝatata leciono estas la angla lingvo. Hobiaj: retumi, rigardi televidon kaj rigardi korbopilkon.

Pri Ping Rong mezalta lernejo kaj Esperanto kurso.

Ĝi estas lernejo kun ĉirkaŭ 3000 studentoj kiuj studas en ĉirkaŭ 10 fakoj (komputado, kuirado, japana lingvo, komerco, infanĝardeno ...). En Ping Tung provinco ĝi estas la plej granda. Ĝi havas longan historion kaj venont-jare oni festos ĝian 50-jariĝon. En sporto ili havas bonan reputacion kaj ekzemple en korbopilko kelkfoje gajnis tutlandan premion inter mezaltaj lernejoj.

Pli ol 130 plentempaj kaj kelkdek duontempaj instruistoj laboras tie.

Esperanto-kurso ekde la jaro 2004 komenciĝis tie en la kadro de eksterkurso lecionaro. En la unua jaro 16 studentoj elektis Esperanton kaj en tiu ĉi jaro 24 studentoj. La ĉi-jaraj lernantoj estas pli seriozaj kaj talentaj kaj bone progresas en lernado. Ĉiu-semajne estas du horoj da leciono kaj Reza (Iranano) kaj Ingrid (Tajvanano) kune instruas.

Ni uzas la internacian lernolibron 'Saluton', de Audrey Childs-Mee, kiun ĉiuj ŝatas. Kun intereso ni studas el ĝi.

Fojfoje ni havas esperantistajn gastojn el eksterlando, kiuj vizitas la kurson kaj parolas kun ni pri siaj landoj aŭ faras demandojn al la lernantoj. Ankaŭ ni aranĝas viziton de lokaj esperantistoj por ke ni aŭdu pri iliaj spertoj. Ni havis gastojn interalie el Nederlando, Hispanio, Hungario kaj Japanio.

KVINO KVIZO

Stefan MacGill

**Legu la rakonton,
(eventuale kovru la tekston)
kaj respondu la kvin kvizo-
demandojn. Kontrolu viajn
respondojn kaj kalkulu viajn
poentojn!**

Menda pen'

Pendas aŝiso en la fenestro de restoracio ĉe populara greka ferio-loko. Sveda paro alvenas kaj legas la aŝison:

**Ĉi tie parolata la angla, franca, germana, greka,
hispana, itala, japana, nederlanda, kaj sveda**

"Ili parolas svede!" diras la edzo, "Kiom oportune! Ni eniru!". Kelnero alportas menuon kaj diras "Saluton!". La gastoj provas mendi svede. La kelnero nur levas la ŝultrojn. Li ne komprenas. Ili do mendas angle – ĉiu svedo lernas la anglan en la lernejo. Sed tion ne faras ĉiu greka kelnero – ĉi tiu evidente ne. La svedoj havas germanajn parencojn, do ili scias mendi germane. Sed la kelnero ne komprenas. La svedoj last-jare feris en Hispanio kaj ne forgesis ĉion. Do, ili mendas hispane. Denove leviĝas la ŝultroj de la kelnero. La svedoj sekvis televidan kurson de la nederlanda lingvo, do ili tiel mendas. La ŝultro-levanta kelnero plue mutas. Franc-lingva mendo-provo rezultas en pli da ŝultro-ekzercado. Ili alvokas la kuiriston kaj provas ĉiulingve. Sen rezulto. Ve, kion fari?"

Feliĉe, la edzino ofte laboras por tradukservo de la Eŭropa Unio kaj tial scias kelkajn vortojn en la greka. Indikante la aŝison, ŝi demandas: "Kiu ĉi tie parolas tiujn lingvojn?"

Venas la respondo: "La gastoj!"



1 Tasko unu: via sumo el naŭ poentoj:

Ordigu la frazojn por prezenti bone la rakonton:

1. La nederlanda mendo-provo ankaŭ fiaskas.
2. Ili mendas angle, sed sen rezulto.
3. Ili komprenas ke la afiŝo tamen ne mensogas.
4. La paro ĝojas kaj eniras la restoracion.
5. La franca provo rezultigas nur ŝultro-levon.
6. Germane ili mendas, sed la kelnero ne komprenas.
7. Sveda paro alvenas al la restoracio kaj legas afiŝon.
8. Ili provas mendi en la hispana, sed sensukcese.
9. Ili vane alvokas la kuiriston – ankaŭ li ne povas helpi.

2 Tasko du: via sumo el dudek ok poentoj:

Sube estas lokoj por sep vortoj el la rakonto. Ni donas la literojn, sed en malĝusta ordo. Malmiksu la literojn kaj skribu ilin en la kvadratojn kaj cirklojn. Poste, prenu la literojn en la cirkloj, rearanĝu ilin kaj uzu ilin por formi la sekretan frazon.

EROTROSCIA	<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	manĝ-loko
RISKUTION	<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	manĝ-pretigiston
ALVENTA	<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	altiganta
ENLEDADREN	<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	holande
JENROLE	<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	instru-loko
KARGE	<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	helena
ALNOTUS	<input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/> <input type="checkbox"/>	'bonan tagon!'

Jen frazo kiu informas pri la komunika kapablo de la restoracio:

○○ ○○○○○○○○○ ○○○○○○○○○○○
○○ ○○ ○○○○○○○○○!

3 Tasko tri: via sumo el dek naŭ poentoj:

Elektu el la kvar respondoj la ĝustan. Skribu la komenc-literojn de la bonaj respondoj en la lastan kolumnon por malkovri la sekretan frazon. Ĝi informas vin kiaj estas la lingvaj kapabloj de la kelnero. Li estas.....

		A	B	C	Ĉ	↓
1	La kelnero alportas ____.	saluton	kuiriston	menuon	fakturon	
2	Laŭ la afiŝo oni parolas __ fremdajn lingvojn.	sep	ok	naŭ	dek	
3	La svedoj lernis la ____ en televida kurso.	nederlandan	svedan	grekan	germanan	
4	La edzino ____ laboras por traduk-servo.	apenaŭ	neniam	ĉiutage	ofte	
5	La svedoj feris en Hispanio _____.	kristnaske	last-jare	hieraaŭ	en 1993	
6	_____ la afiŝon, la edzino demandas.	Referencante	Indikante	Montrante	Skribante	
7	Svede? La kelnero __ levas la ŝultrojn.	ja	tre	nur	apenaŭ	
8	La svedoj estas la ____ en la restoracio.	posedantoj	kuiristoj	kelneroj	gastoj	
9	Al la demando en la greka ____ respondo	mutas	venas	aspektas	falas	
10	Ili ____ la kuiriston.	maldungas	forsendas	laŭdas	alvokas	
11	La gastoj ____ mendi svede.	provas	sukcesas	rezignas	ĝojas	
12	_____ estas tipa greka manĝaĵo.	Maizo	Olivoj	Bananoj	Ananasoj	
13	La svedoj lernis la anglan en _____.	televidejo	familio	lernejo	Usono	
14	Lingvo kiun ili ne provis estas la _____.	angla	greka	itala	franca	
15	La svedoj havas _____ parencojn.	germanajn	francajn	malfacilajn	dikajn	
16	La angla, franca, germana estas ____.	ŝtatoj	dialektoj	lingvoj	eŭropanoj	
17	"Ili parolas svede -- kiom _____."	misprononce	surprize	danece	oportune	
18	La edzino laboras por ____ servo.	Pasporta	traduk-	libro-	manĝ-	
19	Alia maniero diri 'Ĉi tie parolata' estas: 'Ĉi tie ____ parolas'	anoj	ene	inoj	oni	

4 Tasko kvar: via sumo el kvin poentoj:

Donu unu-vortajn respondojn kaj skribu la unuajn literojn en la kestojn, por scii kion faras la lingvoscio de la kelnero:

1. La kelnero faras kion per siaj ŝultroj?
2. Kion vidas la paro en la restoracia fenestro?
3. Kion faras la kelnero kiam li ne respondas al la gastoj?
4. Kiu estas la unua lingvo menciita en teksto kiun la gastoj legas?
5. Kiu estas la nacieco de la gasto-paro?

5 Tasko kvin: via sumo el naŭ poentoj:

Parigu la fraz-komencojn kun la fraz-finoj:

1. La paro eniris la restoracion, ĉar...
2. La edzino parolas la grekan, ĉar...
3. Ili parolas germane, ĉar...
4. Ili parolas hispane, ĉar...
5. Ili parolas nederlande, ĉar...
6. La gastoj povas mendi angle, ĉar...
7. La kelnero plu mutas, ĉar...
8. Krome, la kuiristo ne utilis, ĉar...
9. La afiŝo ne mensogis, ĉar...



- A:** ...ili feriiis en tiulingva lando last-jare.
B: ...ili sekvis televidan kurson.
C: ...la mendon li daŭre ne komprenas.
Ĉ: ...iu en la loko ja parolas tiujn lingvojn.
D: ...ankaŭ li ne komprenis.
E: ...ŝi estas tradukistino por EU.
F: ...ĉiu en Svedio lernas ĝin en la lernejo.
G: ...laŭ la afiŝo oni parolas svede.
Ĝ: ...ili havas tiulingvajn parencojn.

La ĝustaj respondoj aperos en numero 2006/2 de nia revuo. Se vi estas senpacienca, rigardu pli frue en www.lernu.net. Iru al la biblioteko kaj elektu la ligan al Juna amiko. Vi trovos ekde junio 2006 la respondojn. Via rezulto:

$$\square + \square + \square + \square + \square = \square = \square \%$$

el 9 el 28 el 19 el 5 el 9 el 70 el 100

Por kalkuli la elcentaĵon (%), obligu per dek (facile – aldonu nulon!) kaj dividu per sep (malpli facile – trovu kalkulilon aŭ gepatron).

Respondoj por la KvinoKvizo en Juna amiko 2005/3:

Demando 1: La ĝusta ordo estas: 5 7 2 8 6 1 4 3.

Demando 2: Malvera, Vera, Malvera, Ni ne scias, Malvera, Vera, Malvera, Ni ne scias.

Demando 3: 1 = Ĉ, 2 = E, 3 = G, 4 = F, 5 = A, 6 = B, 7 = D, 8 = C.

Demando 4: La viro saltas kun URĜO. Demando 5: PRO BUSO IRANTA SENŜOFORE.


Atako de la boholeoj

Vi kaj la esploristoj eniris la egiptan piramidon kaj staras antaŭ pordo kun mankanta briko. Vi legas la hieroglifojn sur la kvin restantaj brikoj. (vidu en la antaŭa numero, p. 33).



"Estas nur tri simboloj – akvo, birdo, folio." vi diras.

"Jen tri brikoj sur la tero, ni nomu ilin A, B kaj C." diras Roberto.



"Klare, briko B ne konvenas, ĉar ĝi havas fremdan domo-bildon."

"Kaj briko A ne konvenas, ĉar ĝi estas sama kiel la tria briko super la pordo, dum la kvin brikoj tie estas ĉiuj malsamaj."

"Briko C estas la ĝusta, ĉar tiel ĉiu bildo aperas unufoje sur ĉiu briko, kaj ĉu bildo staras precize dufoje en ĉiu pozicio sur la brika serio."

Do, vi metas brikon C en la truon. La pordo malfermiĝas. Vi trairas kaj promenas pli kaj pli al la mezo de la piramido. Post iom da tempo vi alvenas al ĉambrego. De tie estas multaj elirejoj. Vi vidas en la ĉambrego ĉie spegulojn, kaj unu grandan, verdan ŝtonon, kiu brilas – ĝi estas tre bela. Vi iras tien rigardi ĝin, sed post unu paŝo vi aŭdas iun strangan sonon. Vi ne scias, de kie ĝi venas. Sed nun vi vidas, ke multaj strangaj estaĵoj elvenas el la elirejoj. Ili estas tre malbelaj. Ili havas kapon de bovo, korpon kiel de homo, kaj piedojn de leono. Ili kaptas vin ĉiujn.

"Ve! Boholea atako!" krias Sandra: "Kion ni faru nun?"

"Mi ne scias, sed ni atendu, kion ili volas fari." diras Roberto.

"Bone" diras vi kaj sciencisto Karlo.

La aĉaj estaĵoj diras al vi: "Se vi diros malveron, ni bruligos vin! Se vi diros veron, ni ĵetos vin al krokodiloj!"

Nu, kion diri?

Sendu vian respondon por havi ŝancon ricevi premion:

Hajnal MacGill, Lajos u. 47a-3-1, HU-1036 Budapest, Hungario sapiszokni@freemail.hu

Ĉielarko

Jen kanto kiun la infanoj lernis dum la Infana Kongreseto en Pailgis, kaj prezentis en la UK-fermo en Vilno:

litova komponisto

Ri-das la flava su-ne-----to Pe-las la grizan nu-be-----ton

5 En la ĉi---e--lo ĝi dan -----cas kaj Vo-kas nin danci kun ĝi. Ni ri--

9 gar- -du ĉir-kaŭ-e, a-bundas la ko-lor' Kaj a-kompanas ĉi-u---ta-----ge, Koloroj

13 flo----ras ĉi-a----me, ĉi-el-ar-ko sa----me Ko—ron ĝo-jigas dum ri-gard'.

Ridas la flava suneto
Pelas la grizan nubeton
En la ĉielo ĝi dancas kaj
Vokas nin danci kun ĝi

Ruĝa papavo en mano
Flavas la suno brilanta
Verdas kaj verdas folioj
En arbar' en kampar' jam

Rekantaĵo – unufoje post la unua strofo kaj dufoje en la fino:

Ni rigardu ĉirkaŭe – abundas la kolor'
Kaj akompanas ĉiutage
Koloroj floras ĉiame, ĉielarko same
Koron ĝojigas dum rigard'

Muziknotoj: Marianne Lund

Kongresu infane ankaŭ en Italio!

Infanoj venos el multaj landoj al la 37a Internacia Infana Kongreseto (IIK), kiu okazos en Prato, urbo 20 kilometrojn de la UK-urbo Firenzo. Vidu al aldonitan informilon. Nur rimarku ke la anoncita komisiito ne plu validas. Turnu vin al la administranto. Ludoj, sporto, muziko, ekskursoj estos en la programo; ankaŭ teatraj kaj aliaj artaj spektakloj. Anoncis sin pli ol 30 infanoj el deko da landoj. Por pli da informoj, vizitu la hejmpaĝon de UEA: <www.uea.org> kaj rigardu sub la temo 'Kongresoj' Ne malfruas ankoraŭ aliĝi!

MONDA ĈAMPIONADO DE FUTBALO




„*La mondo gastas ĉe amikoj*”. Jen estas la frap-frazo de la 18a Monda Ĉampionado de Futbalo, kiu okazos ĉi-somere en 12 urboj de Germanio. Kiel ĉiam – post ĉiu kvara jaro – denove renkontiĝos la plej bonaj 32 naciaj teamoj el la tuta mondo. Ili estas tiuj, kiuj post multaj kvalifikaj matĉoj, fine atingis sian celon: eblecon partopreni en la Monda Ĉampionado.

Certe multaj el vi interesiĝas pri tiu ĉi sporto kaj kun intereso sekvas la matĉojn de la Ĉampionado. Kompreneble, vi ardos por via landa teamo – se ĝi partoprenos ĝin. Sed certe ankaŭ aliaj matĉoj estos interesaj. Ni jam scias, kiu kontraŭ kiu ludos en la komencaj okopaj ĉampionaj grupoj, sed ni ne scias ankoraŭ, kiuj du teamoj ludos en la finalo, la 9an de julio en Berlino. Ni deziras al la teamoj bon-ŝancojn kaj sukcesojn.

Venku la plej bona!

Kaj nun sekvu kelkaj interesaĵoj el la historio de la pasintaj ĉampionadoj.

- Plej multaj homoj spektis la matĉon de Urugvajo kontraŭ Brazilo en la jaro 1950. En la stadiono Maracana de Rio de Janeiro ĉeestis 174 000 spektantoj. Kun rezulto 2-1 Urugvajo fariĝis la monda ĉampiono.
- La turko Hakan Sükür akiris la plej rapidan golon. En la jaro 2002 nur 11 sekundojn post la komenco de la matĉo kontraŭ Suda Koreio.
- Plej multajn golojn (entute 13) dum unu ĉampionado ŝotis la franco Just Fontaine en la jaro 1958.



- Plej multajn golojn en unu matĉo oni ŝotis en la jaro 1954. Estis la matĉo de Aŭstrio kaj Svislando.

Tiam Aŭstrio venkis je 7-5.

- La plej juna futbolisto, kiu ŝotis golon, estis Pele (Brazilo). Tiam li aĝis 17 jarojn kaj 239 tagojn. Tio okazis en la jaro 1958 en la matĉo inter Brazilo kaj Kimrio.
- La plej aĝa gol-ŝotisto estis Roger Milla el Kamerunio. En 1994, en la matĉo kontraŭ Ruslando, kiam li aĝis 42 jarojn kaj 39 tagojn.
- La plej granda venko estis en la jaro 1982, kiam Hungario venkis

- je 10-1 kontraŭ El Salvadoro.
- En la ĉampionado plej ofte partoprenis Brazilo. Ĝis nun en ĉiuj.
- Plej multajn fojojn Brazilo akiris la titolon de mond-ĉampiono: 5 fojojn.

MONDPOKALO



DE FIFA

- Plej ofte partoprenis la finalon Germanio. Ĝis nun 7 fojojn.
- La plej juna futbalisto dum la ĝisnunaj ĉampionadoj estis Whiteside el Norda Irlando. En la jaro 1982 li aĝis 17 jarojn kaj 42 tagojn.
- La plej multajn matĉojn dum ĉampionadoj partoprenis Lothar Matthäus el Germanio. Li ludis en 25 matĉoj.

Dieter Berndt, Germanio

finalo: lasta, decida sport-ludo / *futbalo:* pied-pilko / *golo:* poento en pluraj pilk-ludoj / *kvalifiki:* elekti la plej bonajn teamojn laŭ la rezultoj / *matĉo:* pilk-ludo, kiu mavas difinitan tempodaŭron / *stadiono:* ovala granda sportejo / *ŝoti:* pied-bati pilkon / *teamo:* organizita grupo de ludantoj / *zeloto:* homo, kiu arde deziras la venkon de iu sportisto, teamo.

HELPANTA MANO


S-ino **Denis Louis**, 81-jara – kvankam ne petita – mem proponis sian apogon al helpinda kaj meritinda lernantino, ne atendante rekompencan de iu ajn. Ŝi volonte pagis 2000 rupiojn por kovri la ŝuldon de lerno-kotizo de la knabino. Hazarde kaj bon-ŝance, tio okazis en la lasta tago antaŭ la limdato, sen mon-puno! Tiu ĝustatempa, nepetita kaj neatendita helpo feliĉigis la tutan familion.

S-ino Denis Louis interesiĝas pri kuirado, kudrado, brodado, kroĉetado kaj similaj artaj man-laboroj. Ŝi parolas la tamilan, francan kaj anglan lingvojn. Post kelkaj monatoj ŝi intencos pilgrimi al Jerusalemo. Ŝi eĉ revas iam ĉeesti Universalan Kongreson (UK) de Esperanto.

Informinto:
s-ino **Saranath**,
Bangalore (Hindio)

Ne forgesu informi nian redakcion, se vi vidas menciindan bon-faron ĉirkaŭ vi.

Kun granda ĝojo ni publikigos viajn raportojn. Skribu!



SENLAĈAJ ABELOJ

Por produkti unu kilogramon da mielo abeloj bezonas 25.000 labor-horojn. Unu abelo dum unu minuto vizitas averaĝe 10 floretojn, kaj unu forflugo el la abelujo daŭras ĉirkaŭ 10 minutojn. Do, abelo povas viziti dum 10 minutoj ĉirkaŭ 100 floretojn. Abelo laboras ekster la abelujo averaĝe 6-7 horojn tage. Dum tiu tempo ĝi vizitas ĉirkaŭ 4.000 floretojn.

Por produkti kilogramon da mielo abeloj bezonas ĉirkaŭ 3.571 tagojn. Se nur unu abelo devus fari la laboron, por tio ĝi devus vivi 200 jarojn.

Abelo-laborulo en somero vivas 50-60 tagojn; kelkfoje eĉ malpli... 35-40 tagojn. La laboro, multaj malamikoj kaj malbonaj veter-kondiĉoj ofte kurtigas la mallongan vivon de abelo. En vintroj abelo povas travivi eĉ 5 monatojn.

En ĉiu somera tago mortas ĉirkaŭ 1.000 abelo-laboruloj. Sed samtempe, tiom – ofte eĉ pli – da novaj abeloj naskiĝas ĉiu-tage. La kvanto de la nov-naskitaj abeloj dependas de la naski-povo kaj juneco de la abel-reĝino. Do, oni konsideras bona abel-reĝino tiun, kies naskipovo rezultigas almenaŭ 2.000 ovetojn dum 24 horoj.

Zoran Ĉirić, Serbio

abelo: insekto, kiu produktas mielon / *averaĝe*: mez-nombro / *kurta*: mallonga.

Frandaĵoj kun

KAPO

havi bonan / klaran kapon

(esti saĝa, logike pensanta)

havi iom da vaporo en la kapo

(esti ebrieta)

havi muŝon en la kapo

(paroli dise-mise)

rompi al si la kapon

(cerbumi, longe mediti)

io venis al li en la kapon

(li ekpensis ion novan)

kalkuli en la kapo

(kalkuli sen papero aŭ kalkulilo)

ordigi al iu la kapon

(severe riproĉi iun)

turni la kapon de virino

(enamigi al si virinon)

tagmanĝo po 10 eŭroj por kapo

(ĉiu persono devas pagi 10 eŭrojn)

teni ion en la kapo

(teni ion en la memoro)

perdi la kapon

(pro io reagi ne laŭ kutima maniero)

veti per sia kapo

(esti absolute certa pri io)

io tagiĝas en lia kapo

(ŝajne li komencas ion kompreni)

anonci premion por la kapo de iu

(promesi rekompencan por informo, ebliganta kapti krimulon)

lia kapo servas nur por porti

ĉapelon

(esti tre malsaĝa)

lia kapo ne estas enciklopedio

(li povas memor-fiksi nur tre malmulte)

enbati ion en ies kapon

(severe enkapigi por ne forgesi ion)

plenŝtopi per parolo la kapon de iu

(altrudi sian opinion per daŭra ripetado)

ventkapulo / malplenkapulo

(kaprice pense vaganta / tre malsaĝa)

KONTROLU VIAN LINGVO-ŜCION PER TESTO


1.	Kiu el la sekvaj homoj ne estas fizika laboristo?			
	A: <i>farbisto</i>	B: <i>pentristo</i>	C: <i>ŝoforo</i>	Ĉ: <i>hejtisto</i>
2.	Kiu afikso ne trovas por si lokon en la donitaj vortoj: <i>estr_ano, _ven_i</i> ?			
	A: <i>-ar-</i>	B: <i>-ig-</i>	C: <i>-aj-</i>	Ĉ: <i>re-</i>
3.	<i>Forir_ŝi prenis la bak_an kukon el la forno. Kio mankas?</i>			
	A: <i>-ante / -ot-</i>	B: <i>-onte / -it-</i>	C: <i>-inte / -it-</i>	Ĉ: <i>-ante / -at-</i>
4.	Kiu besto ululas?			
	A: <i>lupo</i>	B: <i>bubalo</i>	C: <i>kolombo</i>	Ĉ: <i>azeno</i>
5.	<i>Estas... Kiu temp-indiko estas malĝusta?</i>			
	A: <i>la 9a kaj kvarono.</i>	B: <i>kvarono post la 9a.</i>	C: <i>la 9a kaj 15 minutoj.</i>	Ĉ: <i>15 minutoj kaj la 9a.</i>
6.	<i>Mi opinias, ke... Kiu esprimas sin erare?</i>			
	A: <i>Tiel mi opinias, ke...</i>	B: <i>Laŭ mi...</i>	C: <i>Miaopinie...</i>	Ĉ: <i>Laŭ mia opinio...</i>
7.	Kiu frazo estus sensenca? <i>Ni estis manĝ_aj, kiam li alven_.</i>			
	A: <i>-ant- / -is</i>	B: <i>-int- / -is</i>	C: <i>-ont- / -is</i>	Ĉ: <i>-ant- / -os</i>
8.	Kiu frazo estas erara? <i>Ili parolis _.</i>			
	A: <i>en Esperanto</i>	B: <i>je Esperanto</i>	C: <i>Esperanton</i>	Ĉ: <i>Esperante</i>
9.	<i>_ hundo estas _ besto, sed _ mia estas _ ludilo. Kie uzi artilolo(j)n?</i>			
	A: <i>La, la, la, la</i>	B: <i>-, -, -, -</i>	C: <i>-, -, la, -</i>	Ĉ: <i>La, -, -, la</i>
10.	Kiu frazo estas gramatike erara? <i>Mi dankas _</i>			
	A: <i>vin por la helpo.</i>	B: <i>al vi pro la helpo.</i>	C: <i>al vi la helpon.</i>	Ĉ: <i>vin pro la helpo.</i>
11.	<i>_ domon. En kiu esprimo akuzativo estas neakceptebla?</i>			
	A: <i>eniri</i>	B: <i>preteriri</i>	C: <i>eliri</i>	Ĉ: <i>suriri</i>
12.	Kiu el ili certe estas vort-kunmeto?			
	A: <i>diamanto</i>	B: <i>pantero</i>	C: <i>petroselo</i>	Ĉ: <i>sunfloro</i>

(Solvinte la taskojn, kontrolu ilian ĝustecon sur paĝo 11.)

Konversaciaj temoj

help-materialo
por ekzamenotoj

Rubrikestro: Judit Felszeghy



I. Kio estas en via rubujo?

- Ĉu vi disdividas la rubon ĉe vi?
- ???

- Vidu, ni havas plurajn rubujojn: en unu el ili ni metas defalaĵojn de vegetaloj: ŝelojn de kreskaĵoj kaj fruktoj, en la alian - plastaĵojn: saketojn kaj botelojn. Aparte ni kolektas vitrajn botelojn kaj legitajn gazetojn, reklamfoliojn.

- Kaj kio okazas al ili poste?

- Trans la sekva strato, sur placo staras vice rubujegoj kun surskriboj: por vitrajaj, por paperaĵoj, por plastaĵoj. Krom tio, ni pagas neniom pro ili, sed pro tiuj, kiujn oni forportas de apud nia domo per rub-aŭto, ni pagas certan sumon ĉiu-monate.

- Plaĉas al mi tiu solvo. Mi rigardos, kie troviĝas tiaj rubujegoj proksime al ni. Kaj kien vi metas vegetalan restaĵon?

- Ho, ĝi trafas la plej bonan lokon! En la ĝardeno de miaj geonkloj ĝi malkomponiĝas en kompoŝtujo por poste iĝi taŭga nutri la plantojn en bedoj, kiel natura sterko. Tio kostas multe malpli ol arte-faritaj sterkoj, kaj krome, la plantoj preferas ĝin multe pli ol la artefaritajn.

- Kompoŝtujo? Kio estas tio?

- Ĉe ili troviĝas ujo en fora, ombra loko de la ĝardeno. Ĝi estas ĉirkaŭbarita per drata reto. Tien ili metas ĉia-specajn kuirejajn forĵetindaĵojn kiel nemang-eblajn partojn de legomoj, falĉitajn herbojn, ofte ankaŭ ligno-cindron el forno. Ĉio ĉi estas kovrita per maldika ter-tavolo kaj tie ĝi restas dum unu-du jaroj.

Pripensu, kion vi kaj via familio faras por protekti la medion! Ĉu ankaŭ vi disdividas rubojn sammaniere?

Ĉu en frosta vetero vi ŝutas salon aŭ sablon sur la pavimon por ke ĝi ne estu glitiga? Atentu, ĉar salo taŭgas por via manĝaĵo, sed malutilas por la apudaj plantoj, herboj kaj arboj!

II. Surstrataj meditoj

- Estas preskaŭ viv-danĝere atendi ĉi tie, ĉe la bus-haltejo, tiom longe!...
- Pro kio vi opinias tion?
- Vidu, tie kiam la trafik-lampoj iĝas verdaj, la atendantaj aŭtomobiloj apud ni ekiras kaj kovras nin per fumaĉo.
- Kelkaj malnovaj motoroj malbone bruligas benzinon. Multaj uzas sian aŭton, eĉ kiam tio ne estas necesa. En nebulaj tagoj la aero enhavas multe da karbona dioksido (CO₂). Krom ĝi enestas ankaŭ aliaj danĝeraj gasoj.
- Pro tio kulpas ankaŭ fabrikoj! Industriaj filtriloj por ellasi malpli da fumo, kostas pli ol la mon-puno, sekve ili ne uzas filtrilojn.
- Ni bezonus pli da verdaĵo, sed vidu, la maljunaj arboj, laŭ-longe de ĉi tiu strato estis hakitaj jam antaŭ pluraj jaroj, sed ĝis nun la municipo faris nenion.
- Jes ja... Oni atentis nur pri la nunaj kostoj, kaj ne pri la morgaŭo de niaj idoj. Sed jen alvenis la buso kaj ni povos daŭrigi nian diskuton pri la terura trafiko.

Ĉu en via loĝ-loko la aero estas malpura, aŭ ĉe vi ĝi estas freŝa kaj pura?

Ĉu ĉe vi la municipo zorgas pri medioprotektado?

Ĉu en via urbo / vilaĝo estas parkoj, arboj, verdaĵo ĉirkaŭ via loĝejo?

Aĉetante ĉu vi atentis pri tio, ke la varoj ne poluu la aeron (ekzemple gas-ŝprucilaj flakonoj, farboj, lav-pulvoroj)?

Ĉu vi konscias, ke promeniĝante infanojn kaj hejmbestojn surstrate ili enspiras pli da malsaniga aero, ĉar malalte la fumo estas pli densa?

Skribu vian opinion pri medioprotektado. Ni aperigos la plej bonajn en nia revuo. La adresojn vidu sur paĝo 4.

bedo: kreskajejo / cindro: brul-restaĵo / kompoŝto: malkomponiĝejo / malkomponiĝi: biologie disfali / polui: malpurigi aeron, akvon, grundon / rubo: forĵetindaĵoj / sterko: vegetala nutraĵo / vegetalo: kreskaĵo.



Bildoj el la historio de ESPERANTO

Pluraj el niaj legantoj jam delonge deziras havi klaran bildon pri la estinteco de nia lingvo. Feliĉe, mi sukcesis trovi kunlaboranton, s-ron Árpád Rátkai, scienculon kaj spertan hungaran esperantiston, kiu estas preta plenumi tiun gravan taskon. Dankon al li kaj ĝojon / ĝuon al vi pro la sciindaj informoj. (Red.)

I. Mult-lingveco de la mondo

La estiĝo de la homa lingvo okazis dum procezo de multaj dek-miloj da jaroj. Pri la kiolo pluraj supozis monogenezon, t.e.

ekziston de ia pralingvo, el kiu devenis ĉiuj lingvoj de la mondo.

Sed nun-tempe jam alia teorio: poligenezo estas ĝenerale akceptita.

Laŭ ĝi multaj homaj grupoj formiĝis en diversaj lokoj de la Tero. En ĉiu komunumo estiĝis pli-malpli aparta, memstara propra lingvo, kiu diferencis de la lingvoj de ĉiuj aliaj komunumoj. La kapablo posedi kaj

inĝenie uzi lingvon estas universala propreco de la homa gento.

El tiu vid-punkto **diversaj lingvoj estas variaĵoj de la homa lingvo**, kaj la lingva diverseco estas **kultura heredaĵo de la homaro**. Lingva diverseco

respegulas longan kaj komplikan historion de la homa kulturo.


Tamen lingva diverseco havas ankaŭ alian aspekton. La homaro pli grandigiĝis kaj kreskis la popul-denseco sur la Tero. Pli kaj pli oftigiĝis la kontaktoj inter diver-



de la Tero. En ĉiu komunumo estiĝis pli-malpli aparta, memstara propra lingvo, kiu diferencis de la lingvoj de ĉiuj aliaj komunumoj. La kapablo posedi kaj

inĝenie uzi lingvon estas universala propreco de la homa gento. El tiu vid-punkto **diversaj lingvoj estas variaĵoj de la homa lingvo**, kaj la lingva diverseco estas **kultura heredaĵo de la homaro**. Lingva diverseco havas ankaŭ alian aspekton. La homaro pli grandigiĝis kaj kreskis la popul-denseco sur la Tero. Pli kaj pli oftigiĝis la kontaktoj inter diver-

saj lingvo-komunumoj, etnoj. Oni ne nur spertis la lingvan diversecon, sed ankaŭ konsideris ĝin kiel **ŝarĝon, obstaklon**, kiun oni devas venki. Tio certe okazis jam jarmilojn antaŭ la moderna civilizacio, kaj ekde la apero de la skribo tiu opinio aperis plurloke. La plej konata fonto estas la Biblio.



La kaŭzon de lingva diverseco Malnova Testamento klarigis kiel di-
an punon. „*Sur la tuta tero estis unu lingvo... kaj ili diris: Venu, ni konstruu al ni urbon kaj turon, kies supro atingos la ĉielon, kaj ni atingu al ni gloron, antaŭ ol ni disiĝos sur la tuta supraĵo de la tuta tero. ...Kaj la Eternulo diris: Jen estas unu popolo, kaj unu lingvon ili ĉiuj havas: kaj jen, kion ili komencis fari, kaj ili ne estos malhelpataj en ĉio, kion ili decidis fari. Ni malleviĝu do, kaj Ni konfuzu tie ilian lingvon, por ke unu ne komprenu la parolon de alia.*” (Citaĵo el Malnova Testamento, Genezo 11/1-7)

Ellerninte aliajn lingvojn oni povas superi tiun obstaklon. Sed jam en la frua malnova epoko evidentiĝis, ke alian lingvon nur malmultaj homoj povas perfekte posed-preni. Tial estiĝis profesioj: interpretisto kaj tradukisto. Ili estis nemalhaveblaj en la imperioj de malnova epoko. Ilia produkto videblas, interalie, sur la tiel nomata „ŝtono de Rosette” (vidu ĝin ĉi-supre) el la jaro 196 a.K. Sur ĝi en tri lingvoj videblas la sama teksto, edikto de Ptolemaja la 5a.

Ĉu vi volas ellerni melodiozan poemeton kaj per ĝi bone memor-fiksi la plej gravajn kolorojn?

VERSOJ POR KOLOROJ (KAJ SEZONOJ)

Nigra estas pec’ de karbo,
verda la foli’ de arbo,
blua jen la firmamento,
blanka neg’ en vintra
vento;

bruna la printempa tero,
flava suno en somero,
griza en aŭtun’ nebulo,
ruĝa sang’ de best’ kaj ulo.

Rudolf FISCHER,
Germanio

*firmamento: ĉiel-volbo / melodi-
oza: plena de ritmo kaj muziko.*

Biblio: Sankta libro de kristanoj / edikto: supera ordono / genezo: historio de la deveno / gento: samdevena granda hom-grupo / heredi: laŭleĝe ricevi de antaŭulo(j) / ingenia: super-saĝa / interpreti: buŝe traduki / komplika: malsimpla / Malnova Testamento: unua libro de Biblio / moderna: nun-tempa / obstaklo: baro, malhelpaĵo / procezo: iom-post-ioma progresado / teorio: sistemo de opinioj pri iu temo / universala: ĝenerale valida, tut-homara.

En tiu ĉi rubriko vi trovas bildojn el la Esperanta literatura heredaĵo dank' al la plumo de nia fidela amiko, elstara islanda poeto, Baldur RAGNARSSON. Konsciu, ke sen bazaj scioj pri nia historio kaj literaturo oni ne povas fariĝi cel-konscia esperantisto, sukcesa pledanto por nia nobla ideo. (Red.)

25 John Islay FRANCIS

Antaŭ 54 jaroj aperis la unua volumo en bel-literatura eldon-serio de

Stafeto, la eldonejo, kiun fondis Juan Régulo Pérez en La Laguna, Tenerife. Per tiu volumo, titolita *Kvaropo*, la karmemora eldonisto lanĉis mirinde konstantan fluon de altvaloraj li-

broj, originalaj kaj tradukitaj, fluon seninterrompan dum pli ol kvaron-jarcento. Estis aparte konvene, ke tiu unua libro de la nova eldonejo jam eklevis la standardon de nova poezia skolo sur la kampo de nia literaturo. Tiun oni baldaŭ komencis nomi *la skota skolo*, probable nur pro geografiaj kaŭzoj, ĉar la kvar poetoj prezentitaj en la libro – Auld, Dinwoodie, Francis, ĉiuj skotaj, kaj Rossetti – estas tre malsimilaj laŭ stiloj kaj temoj. Unu el tiuj poetoj estis *John Francis*. Pri li temas ĉi tiu artikoleto.

John Islay Francis naskiĝis en 1924, samaĝano de William Auld, lia samlandano kaj amiko ekde junaĝo. Kaj estis Vilĉjo Auld, kiu jam tiam persvadis John lerni Esperanton, kaj jarojn poste, instigis lin komenci aper-

igi siajn poemojn en Esperanto-revuoj. Estis tamen nur per la eldono

BILDOJ EL LA HISTORIO

de *Kvaropo*, ke la du amikoj aperis libre, Auld per sia poemaro *Spiro de l' pasio* kaj Francis per sia granda poemo *La kosmo*.

La kosmo estas ja granda poemo, 71 kvar-liniaj strofoj kiuj dividiĝas iom neegale inter 5 partoj aŭ ĉapitroj. La temo estas eksterordinara: la historio – se oni povas nomi tion historio – de la kosmo ekde „la nigro de nenio” ĝis la fino, kiam „la astroj daŭre dronas en la mallum’ avida”. La ĉefa parto de la poemo tamen ne estas la kosmo ĝenerale, sed la evoluo de nia sun-sistemo kaj de la vivo sur la tero, aparte de la homaro, kiun la poeto sekvas ĝis ĝia rifuĝo al aliaj planedoj for de la mortanta mondo, sed ankaŭ tiuj mortas, ĉar la suno mem formortas, „elkonsumiĝas nigre”. La

poeto bazas sian rakonton sur sciencaj teorioj, kio gvidas lin laŭ vojo de objektiva pesimismo, li nur observas dum sia vojaĝo ekde la komenco ĝis la fino, konstatas senemocie la kosmajn faktojn. La rakonto estas rapida, la epizodoj sekvas unu la alian senhalte, senindulge. Jen la strofo, kiu priskribas la viziton de la homoj sur la luno:

Tombeskajn lun-kraterojn invadas

prozo en Esperanto daŭris pli-malpli 10 jarojn. La romano estas ja ampleksa, preskaŭ 600 paĝoj, sed pli impresa estas ĝia imponeco laŭ temo kaj la ellaborado de tiu temo. Ĝi estas rakonto pri milito, pri sintenoj al milito, pri efikoj de milito. Pli precize la romano rakontas pri personoj kaj eventoj tuj antaŭ kaj dum la du mondmilitoj. Iu-sence temas pri familia kroniko, kie rolas la gefratoj Duncan

LITERATURO DE LA ESPERANTA

*pinta ŝipo, / sur fundo glite haltas,
kaj elgorĝigas homojn, / kiuj explore
grimpas ĝis la kratera lipo, / ri-
gardas nudajn stepojn, montegojn
kaj kanjonojn.*

Sed la homo devas daŭrigi sian esploron, atendas la planedo Marso:

*Ĉe l' morna lun-pejzaĝo ne haltas
homa peno. / La ruĝa marsa sablo
al serĉo lin provokas.*

Ĉu *La kosmo* havas paralelon en aliaj lingvoj, mi ne scias, – certe ne en Esperanto.

John Francis ja verkis pliajn poemojn, sed tamen li estas pli konata kiel verkinto de prozo. Tie elstaras lia romanego *La granda kaldrono*, kiu aperis en 1978. Laŭdire la verkado de tiu ĉefverko de originala

kaj Ina kaj iliaj filoj, kaj multaj flankuloj. La longa okaz-tempo rezultas en du rakonto-fadenoj, kiuj alternas kun epizodoj divers-longaj. Tiu metodo de rakontado faras postulojn al la leganto, sed iom post iom la roloj de la personoj klariĝas. Iliaj sintenoj al la militoj estas diversaj, militemuloj ĉefe troviĝas inter iuj el la flankaj personoj, ĉe la ĉefaj personoj la opinioj malsamas, entuziasmo mankas, sed la aŭtoro klare komprenigas, ke libereco de elektoj por aŭ kontraŭ en tiaj cirkonstancoj estas limigita. Priskriboj estas realismaj, precipe pri la okazaro en la unua mondmilito. Dialogoj, ofte longaj, formas gravan parton de la verko, ili estas realisme vivaj kaj plifaciligas la legadon, kiu okaze lacigas per siaj senindulgaj

postuloj. Entute, la romano de Francis estas verko de digna stabileco, bazita sur la profundaj spertoj, longdaŭra meditado kaj kree eltenaj kapabloj de realisma verkisto.

Apenaŭ troviĝas en nia literaturo verkoj kompareblaj kun *La kosmo* kaj *La granda kaldrono*, ili estas unikaj. Sed John Francis aŭtoris ja pliajn verkojn: scienc-fikcian romanon, *Misio sen alveno* (1982) kaj du novelarojn, *Vitrulo* (1960) kaj *Tri rakontoj pri la Miljara Paco* (1998).

Misio sen alveno estas lerte verkita rakonto laŭ la kutima formulo pri kosma vojaĝado, esplorado de aliaj planedoj kaj civilizoj, saltoj de universo al universo, senfina serĉado de neniam atingotaj celoj. Sed la aŭtoro uzas la sciencfikcian formon

por pli aktualaj esploroj de diversaj homaj kondiĉoj, pri konduto de homoj, pri la sento de homa soleco en fremdaj cirkonstancoj, kio donas apartan dimension al la rakontado. La du novelaroj grandparte estas fabelecaj rakontoj kun mesaĝo, kompetente disvolvitaj; du noveloj en *Vitrulo* tamen staras aparte kiel realisma pritrakto de mensokaptaj temoj: *La tuŝo de morto* pri sperto de bombaviadila ekspedicio en la dua mondmilito, kaj *Ĝermoj en rikolto* pri rilatoj inter aro de infanoj en Skotlanda insulo.

John Islay Francis estas eksterdube unu el niaj plej kompetentaj prozverkistoj. Lia ĉefverko, *La granda kaldrono*, nepre meritas reeldonon kaj plian atentigon inter la legataro.

Ĉu vi scias...

(Solvej)

1. Sur la bordoj de Nilo, Egiptio; reĝo Menes fondis ĝin en la jaro 2920 a.K.
2. Svisoj Henri DUNANT, en la jaro 1864.
3. De la latina vorto 'biblia' = libroj.
4. Punejo, en kiu la membroj de iu etno estas severe gardataj.
5. La unuajn koncentrejojn organizis hispanaj koloniistoj.
6. Sen perforto, per civitana malobeo.
7. Irano.
8. Ramadano.
9. Proponis ĝin usonano Ray Tomlinson, la inventinto de ret-poŝto.
10. Akvo. La unuaj akvo-horloĝoj estis cilindraj vazoj kun trueto sur la fundo. La trafluanta akvo-kvanto indikis la tempon.

a.K.: antaŭ Kristo / *Biblio*: la sankta libro de kristanoj / *civitano*: plen-raĵta membro de ŝtato / *etno*: hom-grupo, kiu havas komunan originon kaj tradician / *fasti*: manĝi tre malmulte kaj sin deteni de iuj manĝaĵoj / *iniciati*: proponi estigi / *inventi*: elpensi ion novan / *judo*: popolo, kiu loĝas en Israelo kaj en multaj landoj de la mondo / *kolonio*: lando, teritorio sub la jago de iu popolo, kiu perforte okupas ĝin.

VERDA PAĜO

FAKTOJ KAJ ARGUMENTOJ PRI ESPERANTO

Tiu ĉi rubriko servas niajn novulojn. Oni ofte faras al ni demandojn, kiujn – pro manko de sperto – estas malfacile respondi, konvinke rebati. Ĉi tie ni deziras liveri utilajn faktojn kaj respondojn.

Nun ni lasas iom ripozi niajn kutimajn rolulojn: Scivolulon kaj Ĉefkomputilan Moŝton. Ni vizitos ilin en la septembra numero.

La ĉi-suba konfeso de nia usona amiko aperis antaŭ preskaŭ ok jaroj, tamen mi prezentas ĝin al vi, ĉar ĝis hodiaŭ ĝia aktualeco perdis neniom. Male, vi trovas en ĝi plurajn brilajn pensojn, konvinkajn argumentojn.

◀ KIAL USONANO UZAS ESPERANTON? ▶

Novaj renkontitoj foje esprimas surprizon, kiam ili ekscias, ke mi, usonano, uzas Esperanton anstataŭ la anglan en Japanio.

Foje oni eĉ ne kredas, ke mi efektive estas usonano, ĉar ili aŭdis min paroli nur Esperanton.

Nu, estas vere, ke la plimulto el la usonanoj preferas uzi la anglan. Multaj usonanoj opinias, ke la angla sufiĉas, kaj ke ĉiu en la mondo devus lerni ĝin. Kial do mi preferas uzi Esperanton por komunikiĝi kun neusonanoj? Jen kelkaj kialoj:

➤ **Amikeco**

Dum longaj vojaĝoj mi rimarkis, ke la plimulto el la homoj, kiuj alparolas min per la angla, ne interesiĝas pri mi kiel homo, nek pri mia kulturo. Ili interesiĝas unua-vice pri mono: Ili aŭ volis vendi ion al mi, aŭ volis lerni la anglan de mi, por povi ricevi pli bonan edukon kaj pli alt-salajran postenon, aŭ ion alian. Kontraste, granda procento de la homoj, kun kiuj mi parolas Esperanton, interesiĝas pri mi kiel homo, aŭ pri mia kulturo. Multaj el ili deziras amikiĝi, kaj efektive multaj el ili fariĝis miaj amikoj.

➤ **Egaleco**

Se mi parolas angle kun japano aŭ iu alia, kies denaska lingvo ne estas angla, mi ĉiam, nepre, havas la pozicion de spertulo pri la lingvo, kaj negrave, kiom multe tiu alia persono studis la anglan, li aŭ ŝi nepre parolas el malpli alta pozicio, kiel lernanto al instruisto aŭ subulo al estro. Se anstataŭe ni interparolus per la lingvo de mia kunparolanto, ekzemple la japana, la situacio estas simila. Tia malegaleco tre malhelpas interamikiĝon.

➤ ***Pord-malfermo***

Dum mia longa mond-vojaĝo, Esperanto malfermis al mi multegajn pordojn figure kaj laŭvorte. Mi tranokte gastis en 150 hejmoj de esperantistoj dum la tri-jara vojaĝo, kaj nek unu nokton mi pagis en hotelo!

Kelkaj el miaj bonaj amikoj, post jaroj da amikeco, konfesis al mi ke, antaŭ ol renkonti min, ili malŝatis usonanojn. Do, se mi uzus la anglan, mi certe ne povus ekamikiĝi kun tiuj homoj, kiuj nun estas tre karaj amikoj. Esperanto ja malfermis la pordon al ili.

➤ ***Helpi la mondon***

Laborante por disvastigi Esperanton, mi havas la senton, ke mi faras ion utilan al la mondo. Se homoj tra la mondo povos libere interkomunikiĝi kiel egaluloj, kaj interamikiĝi per Esperanto, certe la mondo fariĝos pli bona, pli justa, pli simpatia. Mi ne imagas, ke Esperanto sola solvos ĉiajn mond-problemojn, sed ĝi ja povas helpi la homojn ellabori solvojn.

➤ ***Kreemo***

Mi tre ŝatas uzi Esperanton, ĉar ĝi kondukas al plia kreemo. Pro la granda fleksebleco en la lingvo, mi sentas liberecojn verkante aŭ parolante en Esperanto kompare kun la angla, kies strukturo kaj vort-stoko estas relative fiksitaj. La ebloj krei novajn esprimojn en Esperanto estas preskaŭ senlimaj; estas granda ĝojo esplori ilin, kaj trovi trajajn esprimojn, uzante jam ekzistantajn erojn.

➤ ***Valoraj spertoj kaj memfido***

Trairante pordojn malfermitajn per Esperanto, mi ricevis multajn valorajn viv-spertojn, kiujn mi ne facile povus havi sen Esperanto. Tiaj riĉaj vivspertoj multe kontribuas al mia memfido, kaj preparis min pli kompetente agadi en la mondo.

➤ ***Nova mond-koncepto***

Eble la plej grava profito, kiun mi ricevis el mia uzado de Esperanto, estas drasta ŝanĝo de mia mond-koncepto. Antaŭe mi imagis, ke la mondo plenas je fremduloj – homoj tre malsamaj kaj ne alireblaj. Kun „fremduloj” oni ne povas multe simpatii, ĉar ili ja estas fremdaj, ĉu ne?

Tamen, pro miaj travivaĵoj, uzante Esperanton, mi malkovris, ke tiu imago estis tre erara. La mondo plenas ne je fremduloj, sed je homoj samaj kiel mi kaj miaj familianoj. Kaj plue, tre multaj el tiuj homoj deziras esti miaj amikoj, se ili havas okazon renkontiĝi kun mi. Do, ili estas ne fremduloj, sed amikoj aŭ estontaj amikoj.

Kia granda diferenco! Nun mi sentas min reale ligita al homoj tra la mondo. Kaj mi ne plu sentas min katenita al nur unu parto de la mondo, al nur unu lingvo, nur unu kulturo. Mi estas libera interagi kun homoj tra la mondo, ĉar ĉie troviĝas amikemaj homoj, kaj ĉar Esperanto donas al mi la rimedon facile interparoli kun ili.

Joel Brozovsky (Esperanto, n-ro 1, 1998)

LINGVA DOKTORO

H

Kiam sola kaj kiam sole ?

Mi elektis kiel titolon la vort-paron *sola / sole*, ĉar kelkaj esperantistoj hezitas ĉe jenaj frazoj: *Hieraŭ li sola / sole veturis. Li unua / unue solvis la taskon. Li kuŝis malsana / malsane en la lito.* Kiel decidi pri la ĝusta formo?

Estas facile. Pensu pri tio, ĉu vi volas prezenti la **staton** de la subjekto (ĉi-kaze de „li”), aŭ la **manieron** de la ago, kiun la subjekto plenumas.

En la unua kazo, kiam la frazo estas kompletigebla jene: *Hieraŭ li estis sola (neniu akompanis lin), kiam li veturis. Li estis la unua, kiu solvis la taskon. Li estis malsana kaj kuŝis en la lito.* Kiel vi vidas, en ĉiuj tri ekzemploj temas pri la stato de la subjekto (li). Pliaj ekzemploj: *Li venis hejmen ebria. Mi rigardis la filmon duon-dorma. Nuda ŝi dancis en nokta lokalo. Ni liberaj parolas facile, sed malliberaj timas ekparoli.*

Adverboj (e-vortoj) karakterizas la agon, ne la aganton. Ili montras la manieron, laŭ kiu agas la subjekto. En la supraj ekzemploj: *Hieraŭ li sole veturis* esprimas, ke hieraŭ li faris nenion alian ol veturis, alie: *li nur veturis (sole = nur), Li unue solvis...* (poste eble

legis aŭ ludis...), li malsane kuŝis... (eble li ne estis malsana, sed imitis la kuŝ-manieron de malsanulo), ktp.

Kaj nun mi mencias alian sufiĉe oftan aferon. En la ĉiu-tagaj lingvo-uzo oni renkontas unu-vortajn stat-adjektojn aŭ predikativojn. Vi iras ekzemple al vendejo kaj vidas sur la enir-pordo surskribon: *fermita* (subkomprenu: *la vendejo estas fermita*). Aŭ en restoracio sur la tablo vi vidas paperon kun la vorto: *rezervita* (t.e. *la tablo estas rezervita*). En la komputilejo via kolego riparos la monitoron kaj sur apuda slipeto sciigas vin: *riparita* (subkomprenu: *la monitoro estas riparita*). Kaj oni povus vicigi multajn ekzemplojn. Mi ne eĉ unu-foje vidis en tiaj kazoj e-formojn. Responde oni argumentis, ke mankas la subjekto. Jes, vere, ĝi mankas, sed ĉiu ja aŭtomate subkomprenas ĝin. Kion vi dirus, se la respondon: *Kia estas la hundeto?* iu respondus jene: *Vundite. Ĉu???*

Atentu pri la uzo de *a*-finajaj stataj adjektoj, kiuj povas rilati ankaŭ objekton, sed pri tio aparte, en alia fojo.

Geza Kurucz

ampleksa: vasta, riĉa, mult-nombra / *asigni*: doni (mon)rimedojn por aparta celo / *asocio*: grava societo por iu celo / *budo*: malgranda konstruaĵo el tabuloj / *buĝeto*: detala antaŭkalkulo de jaraj en- kaj elspezoj / *debuti*: unua-foje prezenti sin antaŭ publiko / *entuziasmo*: arda emo al io / *foiro*: granda komerca kunveno / *merkato*: akcepto-povo por iu varo fizika aŭ spirita / *motivo*: tio, kio igas iun agi / *projekto*: ideo proponata kiel efektivigota / *propedeŭtiko*: instruado prepara al postaj studoj / *provizi*: ricevigi en bezonata kvanto / *skipo*: labor-grupo / *teamo*: aro da homoj por sama laboro aŭ ludo / *teko*: kolektaĵo de dokumentoj, paper-folioj / *trampolino*: alta saltotabulo, de kiu oni plonĝas en akvon / *trejni*: alkonduki al dezirataj stato kaj kapabloj.

Projekto Trampolino ►►►►►►►►►►

Lasta-tempe Britio eliris kun interesa projekto por enkonduki Esperanton en la unua-gradaj lernejoj de Anglio.

Sciu, ke la brita registaro maldevegis en la dua-gradaj lernejoj la lernadon de fremdaj lingvoj (ja vere!) kaj samtempe enkondukis ilin en la unuagradaj lernejoj, kie ĝis nun ili ĝenerale ne instruiĝis. Oni supozas, ke la motivo de la registaro estis ke, se junaj lernantoj sukcesos pri fremdaj lingvoj en la unuagradaj lernejoj (7-11 jaroj), ili *volonte* plustudos ilin en la duagradaj ... (?)

Tamen, tiu politiko prezentas, por la unuagradaj lernejoj, plurajn problemojn. Unue, instruistoj pri fremdaj lingvoj mankas en la unuagradaj lernejoj. Krome, se diversaj lernejoj ofertas diversajn lingvojn (laŭ diversaj instru-programoj), kio okazos, kiam la lernantoj kunvenos en la duagradaj lernejoj – ĥaoso, ĉu ne?

Jen racia fundamento por Esperanto, ne por ĝi mem, sed kiel enkonduko al fremdaj lingvoj, kiel *trampolino* al lingvolernado. Instruistoj povas lerni Esperanton multe pli facile ol aliajn lingvojn; kaj krome, ĝi servas bonege kiel alirvojo al iu ajn fremda lingvo (en la duagradaj lernejoj). Necesas nur provizi la “merkaton” per taŭgaj lern-materialoj por tiu celo.

Angela (Anĝela) TELLIER, sperta instruistino kaj kreinto de la projekto, pasint-jare prezentis proponon al la komitato de Esperanto-Asocio de Britio (EAB). Ĝi bon-venigis la proponon kaj asignis adekvatan buĝeton por krei la necesan materialon kaj trejni instruistojn. Sekvis kvin monatoj da superhoma aktivado de *Angela* kaj de skipo de entuziasmaj volontuloj (ĉiuj instruistoj) kaj fine, ĉe la prestiĝa “Lingva Foiro” en Londono, novembro 2005, debutis la tre bel-aspekta, ampleksa *Instru-pakaĵo* de la Projekto. Reaperis lernolibroj, vortareto, angla-lingva enkonduko al Esperanto, simpla legolibro, la bild-vortaro *Mil Unuaj Vortoj*, kompakt-disko kaj variaj instru-helpiloj, ĉiuj en bel-aspekta plasta teko.

Dum la Foiro pluraj centoj da homoj vizitis la Esperanto-budon. Samtempe, *Angela* kaj ŝia teamo kontaktis ĉiun lokan eduk-istancon por anonci (per belega *Inform-pakaĵo*, p.52) la projekton kaj same multajn unuopajn lernejojn. La inform-pakaĵo inkluzivas tre interesan folion verkitan de *Renato Corsetti* (prezidanto de UEA) kaj *David Kelso*, pri la propedeŭtika valoro de Esperanto.

Jam vidiĝas iom (sed ne tiom!) da intereso de lernejoj kaj de eduk-instancoj! Evidentas, do, ke oni devas daŭre puŝi la aferon kaj sur nacia kaj loka niveloj. *Angela* kaj la projekto-skipo aktuale okupiĝas pri dua rondo de inform-atako per leteroj kaj respondoj al inform-petoj.

◀ *Piednotoj sur paĝo 49.*

David KELSO, Britio

What is Esperanto? It is a language created over a hundred years ago and is spoken by millions of people worldwide. Known as the "international language", Esperanto is intended as a second language for all. Using it will help you share ideas with people all over the world.

Look At

ESPERANTO

My name is David and I'm trying to find out about life in other countries. I've learnt a bit of French and a few words of German and I've been on a day-trip to France. I found I couldn't say all I wanted to say and I didn't understand much of what people said to me. Many of them didn't speak English.

I'd like to visit other countries, but I read somewhere that there are as many as 3,000 languages in the world. I can't learn all of them – what am I going to do?



I spent some time on the net looking for languages and I came across one called Esperanto.

I'd not heard of this before, but I discovered it's a planned, or specially designed, international language, much easier to learn than other languages.

This seemed like a good idea and I wanted to know more.

I typed Esperanto into the search engine and found loads of pages telling me all about the language. It seems there are Esperanto speakers in over 100 countries.



I was surprised to find out that the person who devised Esperanto was still at school when he came up with the idea.

Before he'd finished school he'd created a working language which he could use with his friends. His name was Ludoviko Zamenhof.



Did you know ... ?

Esperanto has a "birthday". July 26, 1887 is the date when Zamenhof published his first book about the new language. What other languages can claim to have a "birthday"?

Springboard...

to languages!



A unique introduction to foreign languages
for all pupils at
Key Stage 2